HUNGARA VIVO

5
1977
8 Ft

KOMENCU ĈE SKÁLA!

SKÁLA

VARSKALO

NI ATENDAS VIN

de la 7-a horo
ĝis la 20-a horo

en nia nutraĵ-sekcio

de la 8-a horo
ĝis la 19-a horo

en nia sekcio
de multspecaj
industri-varoj

Kliento-servo: 850-850

E HUNGARA VIVO

Revuo de Hungara Esperanto-Asocio
Adreso: H—1081 Budapest
VIII. Kenyérmezõ u. 6.
Poŝta adreso: H—1368 Budapest
Pf.: 193.
Aperas dumonate
XVI. jaro 1977. 5-a numero

ENHAVO

Gyurkó, L.: Sieĝo de la Vintra Palaco (VHZS) 1
Majakovski, V. V.: Bonege (K. Gusev) 4
Fenyvesi, E.: John Reed 6
Brecht, B.: La tapiŝteksistoj el Kujan-Bulak honoras Leninon (A. Fernández) 7
Balázs, B.: Parencoj (Rieth, L.) 9
Hohlov, N.: 1905 (Moskvo) 9
Internaciistoj por la Oktobra Revolucio 10
Heltai, G.: La enfermita reĝedzino (Haszpra, O.) 11
Nemere, I.: Murtapiŝo, — Mi, la murdisto 15
Bálint, Sz.: Panoramo 16
Szabó, M. R.: Revuo de revuoj 20
Malzberg, B. N.: Demisiletero (K. Pov) 21
D-ro László, F.: Akvoekonomio estas komuna afero de la socio (Pechan, A.) 22
Lesznai, L.: Gusto kaj modo 26
Haszpra, O.: Tibor Újlaky-Nagy mortis 27
Kořínek, J.: Al la verkistino Magda Szabó 27
Recenzoj (Benczik, Fenyvesi) 28
Krucenigmo 30
Ŝako 31
Leterkesto 32
Korespondi deziras 32

Sur la titolpaĝo: La Vintra Palaco kun la Aleksandro-kolono en Leningrado (Foto de Z. Fejér)

SIEĜO DE LA VINTRA PALACO

Matene de la 24-a de oktobro kuniĝis en *Smolnij* dek anoj de la Centra Komitato. Ci-foje ili ne pridiskutis politikajn demandojn, sed disdividis la taskojn. Al *Bubnov* estis konfidita la fervojo, al *Dzerĵinskij* la poŝto kaj la telegrafo, al *Miljutin* la provizo per nutraĵoj, al *Lomov* kaj *Nogin* Moskvo, al *Kamenev* kaj *Berzin* la traktadoj kun la maldekstraj socialrevoluciuloj, kaj *Sverdlov* devis teni la okulojn sur la Provizora Registaro kaj ties organoj. En la fokuso de la diskutoj, ĉi-foje, ne staris politikaĵoj, sed la demando: kien retiriĝi se estos necese, ĉu en la fortikaĵon Petro-Paŭlo, ĉu sur la Aŭroran, ĉu sur iun minbalaan ŝipon. Tiuj homoj, kiuj fariĝis subite la stabo de la ribelo, apenaŭ uzis pafilon eĉ unufoje dum sia vivo. Sed ankaŭ inter tiuj, kiuj ellaboris la precizan militplanon, kiuj estris la movojn celantajn okupi la pontojn, la strategiajn punktojn, la registarajn sidejojn: la urbon kun du milionoj da loĝantoj —, neniu troviĝis, kiu havus pli altan rangon ol leŭtenanto.

Tamen, tiu sensperta stabo kulpis nur unu eraron: ili ne povis konkeri laŭeble plej rapide la Vintran Palacon, kvankam tiu plano estis prilaborita kun la plej alta precizeco: ĉiu kompanio, ĉiu formacio de ruĝ-gvardianoj, ĉiu taĉmento de maristoj havis siajn fiksitajn lokojn. Ĝuste en tio konsistis la eraro. La multaj taĉmentoj konfuziĝis inter si, kaj malfruĝis. Laŭplane ankaŭ la palaco estus okupota dum la nokto, poste tio prokrastiĝis ĝis la sekva tagmezo, tamen, eĉ posttagmeze ankoraŭ estis observebla la vigla en- kaj elirtrafiko ĉe la pordo de la palaco. Nur je la sesa finiĝis la ĉirkaŭfermo, sed eĉ tiam ankoraŭ ne komenciĝis la atako. En Smolnij la ribelantoj sidis sur pingloj; jam devus komenciĝi la kongreso de sovetoj, kaj ili volis, ke ĝis tiam la ribelo finiĝu. Sed la sieĝo de la palaco daŭradis; tamen, la kongreson ili devis jam komenci.

* * *

Blagonravov, komisaro de l'fortikajo Petro-Paŭlo skribas: „Ni staris malbone, rilate la artilerianojn. La eskadro postenigita en la fortikajon, ne estis fidinda. En la antaŭaj tagoj, la eskadraj oficiroj kaj tiuj soldatoj, kiuj loĝis en Petrogrado, ne prezentiĝis por militservo. Tamen ni ne havis alian elekteblecon: kvankam ne volonte, sed mi komisiis kamaradon Pavlov, la plej fidindajn artilerianojn kaj iun el la oficiroj, pri la manipulado de la kanonegoj, kaj mi tuj sendis ilin kontroli la kanonojn, lokigitajn antaŭe de ni. Baldaŭ prezentiĝis la delegito de la eskadro kaj ties komandanto, juna batalionestro (lian nomon mi jam forgesis). Ili deklaris sin venantaj komisie de la eskadra kunveno por anonci, ke la eskadro, samkiel de la 3-a ĝis la 5-a de julio, eĉ nun restas neŭtrala, sekve ili malakceptas delegi artilerianojn por manipuli la kanonojn, ĉar ili principe malakceptas interveni en la batalon, nek sur tiu, nek sur la alia flanko. La situacio fariĝis kriza — ĉar ne disponeblis aliaj artilerianoj. Ni tuj iris en la kvartiron de la eskadro. Tie jam ĉiuj estis kolektiĝintaj. Mi klarigis, ke ilia



La krozŝipo Aŭrora ne finis sian historian rolon dum la revolucio. En la jaroj de la dua mondmilito dum la blokado de Leningrado ĝi estis denove enbataligita

Ĉefa enirejo de la Fortikaĵo Petro-Paŭlo (Ambaŭ fotoj de Z. Fejér)

konduto estas abomeninda, kaj en la nomo de la Petrograda Soveto mi postulis, ke ili obeu miajn ordonojn, kaj mi avertis ilin pri la tre malagrablaj konsekvencoj, se ili rifuzas la obeemon. Videble, mia parolo rezultis efikega. Mi ripetis la ordonon: ili delegu konvenan nombron da artilerianoj, kiuj ekzamenu la kanonojn kaj ekpafu sur la Vintran Palacon. Post mallonga hezitado, la ordono estis plenumita; grupo de artilerianoj, gvidata de la eskadrestro foriris en direkton al la kanonoj. En la sama momento oni anoncis alvenon de kamarado *Antonov,* kune kun la maristoj de Aŭrora. Antonov diris, ke li volas proksimigi Aŭroran al la ponto *Nikolajevskij,* kaj se eblas, lokigi ĝin malantaŭ la ponto, tute proksime al la fortikajo. Inter la fortikaĵo kaj Aŭrora, vaporkutro garantiis la kontaktojn. Ni rapide interkonsentis pri la detaloj de la plua atakplano. Ni decidis, ke konstatinte la batalpretecon de la taĉmentoj ĉirkaŭantaj la Vintran Palacon, kaj post kiam la kanonoj estos haŭlitaj en la fiksitan lokon, ni metos ruĝan signon sur la fortikaĵan maston, la signon de la preteco. Ĝuste tiam Aŭrora ekpafos, unue en la aeron, kaj se la Provizora Registaro ne kapitulacos, la fortikajo ekpafos per kugloj al la palaco. Al la Provizora Registaro ni sendis ultimaton; ricevinte ĝin, la registaranoj disponos pri dudek minutoj por pripensado.

La ultimaton subskribis Antonov kaj mi. Volontulo akceptis forporti ĝin per motociklo. Finfine, Antonov povis foriri. La kutro, kiu garantiis la kontaktojn kun Aŭrora, alvenis ĝustatempe. Vesperiĝis. Neatendita bagatelaĵo perturbis nian planon: ni ne trovis lampon, per kiu eblus signali. Post longa serĉado ni sukcesis havigi unu, sed montriĝis ege malfacile fiksi ĝin sur la maston tiel, ke ĝi estu videbla: do, *Tregubovič,* entrepreninta efektivigi tion, terure nervoziĝis pro la malsukcesaj provadoj. Dumtempe mi vizitis la kanonojn. La urbon ekkovris oktobra nokto; la lampolumoj brilis sur la dancantaj, profundaj ondoj de l'rivero *Neva;* en la urbo, la vivo daŭris kiel alitempe; longa vico de tramoj tintegis, laŭte sonoradis, trapasante la ponton *Troicki;* videblis la figuroj de piedirantaj homoj kaj aŭtomobiloj; nenia signo aludis la komencon de la oktobra batalo. Areto de artilerianoj grupiĝis ĉirkaŭ la grandegaj salikoj, kiujn la oktobra frosto senhavigis de foliaro. Je kelkaj paŝoj senmova amaso da kanonoj gapadis nin. Kiam ni proksimiĝis, ŝajnis, kvazaŭ la artilerianoj subite eksilentus: kvazaŭ io ne estus en ordo. Ni proksimiĝis plu. La batalionestro alvenis nin, anoncante, ke ne eblas pafi per la kanonoj, ĉar ili estas malzorgitaj, rustiĝintaj, en la kunpremiloj mankas oleo, tial ili eble eksplodos pro la unua ekpafo. Mi fariĝis suspektema, ekflarante malvolon. Terure koleriĝinte mi preskaŭ prenis pistolon, sed tuj antaŭ ol agi senpripense, mi ekregis min. Mi pridemandis la ĉeestantojn. La pirotekniki stoj kaj artilerianoj unuanime asertis la samon. Koncerne kanonojn, mi tute ne estis sperta, do mi ne povis decidi, ĉu ili mensogas aŭ ne. Tuj mi ekmemoris, ke Pavlov scias ion pri kanonoj, sekve mi decidis komisii al li la refojan kontrolon de la kanonoj. Kiam mi adiaŭis ilin, la batalionestro diris: — Vi ja ne kredas

min, sed mi donas mian vorton, ke ĉio estas vera. Pafi per la kanonoj estus ege danĝere. — Dume, el direkto de la Vintra Palaco ektondris la unuaj pafoj: komence nur sporade, poste ĉiam pli ofte aŭdeblis pafadoj. En la dejorejo oni sciigis, ke la Pavel-regimento bataladas kun la poroficiraj lernejanoj, kunigitaj en la Vintra Palaco. Unu post alia sekvis telefonvokoj de Smolnij, postulante, ke mi tuj komencu la pafadon... Tiam subite brufermiĝis la postenĉambra pordo, kaj enkuregis *Antonov*, terure ekscitita. Li verŝis inundon da riproĉoj sur mian kapon, ĉar mi dum tiel longa tempo prokrastas la ekagon. Mi mallonge klarigis la situacion, kaj proponis, ke ni iru rigardi la kanonojn, kie Pavlov jam estas laboranta. Ekstere, la vespero jam fariĝis pli profunda; ekpluvis, la vojon kovris kvazaŭ marĉo, ni malfacile travadis ĝin. El direkto de la Vintra Palaco, aŭdeblis vigla pafiltondrado, kiun foje-foje venkis kriado de mitraloj. Ankaŭ niaj homoj pafadis sen konsidero de l'celpunktoj, direkton al *Nabrečna* kaj la Vintra Palaco, kuŝantaj sur bastionoj de la fortikaĵo; la porofociraj lernejanoj kelkfoje repafis. Antonov, kiu havis malbonan vidkapablon, falis en la marĉon; la koto elŝprucis kvazaŭ fontano, ni ambaŭ plenkovriĝis per ĝi, de kapo ĝis piedoj. Pro la profundega vespero ni misvojiĝis, tial ni erarvagadis dum certa tempo, laŭ la zigzagaj fortikaĵaj vojoj... Finfine, ni alvenis al la kanonoj. Pavlov kaj Kondakov reasertis ĉion, kion la artilerianoj diris antaŭe. Eĉ sub lumo de petrollampo estis videblaj grandaj rustmakuloj ĉie sur la kanonoj, kaj la du kamaradoj konstatis ankaŭ tion, ke mankis oleo en la kunpreniloj: ĉiamaniere, rezultus ege danĝere pafi per tiuj ĉi kanonoj. Kion fari? Ĉu ni trovos kamaradojn, kiuj kapablos pafi, kiuj emos oferdoni sian vivon por la revolucio? Ie, en la malproksimeco, ŝmacadis en la koto la paŝoj de kuranta homo; poste ni aŭdis, ke la nekonatulo mispaŝas kaj falas; ni aŭdis lian viglan blasfemadon, poste li ekkriis ĝoje: — Kie estas kamarado Blagonravov? — La voĉon sufokis eŭforio. Admirinda

Okupo de la telefoncentralo

sciigo: la Vintra Palaco kapitulacis, niaj homoj konkeris ĝin!

Reen, en la postenĉambron!

Du maristoj alvenis baldaŭ, kunportante leteron de kamarado Laŝevič, atestantan, ke ili estas artilerianoj kaj metiĝas sub mian disponon.

— Vi malfruiĝis, kamaradoj — mi diris. — Jes, se vi prezentiĝus antaŭ du horoj, ni povus tre bone utiligi vin ambaŭ.

Mi klarigis al ili la situacion kun la kanonoj. Ili respondis, ke ili estas ekzercitaj por manipuli per kampadaj kanonegoj, tamen ili opinias, ke eble oni povus pafi ankaŭ per tricolaj kanonoj; kvankam ne sen risko.

Mi decidis iri en la okupitan palacon.

Sed ne estis vera la novaĵo pri l'konkero de la Vintra Palaco, ĉar estis okupita nur la komanda sidejo, troviĝanta kontraŭ la palaco. Ni decidis tuj komenci intensan pafadon, el la direkto de l'fortikaĵo. Reirinte mi konigis la ituacion al la maristoj, kaj mi klarigis, kiel ili agu. Samtempe mi ordonis komenci kunan mitralpafadon laŭlonge de la bordo, direkten al la palaco. La bruado de pafoj baldaŭ konvinkis min, ke la ordono estis laŭvorte plenumita. Eĉ la kanonoj fariĝis jam pretaj je batalo; ŝargintaj ilin, la maristoj atendis ordonon; sub komando de kamarado Popel, ni ekformis batallinion laŭlonge de la bordo, por defendi la kanonojn (kvankam el direkto de la akvo ne estis verŝajna la atako, eĉ uzante boatojn).

Ricevintaj la ordonon, la maristoj senhezite, rapide ekpafegis la palacon. Kvankam la pafado rezultis ne tre danĝera, estis senmezura ĝia morala efiko. La kanonoj de Aŭrora ankaŭ ektondris. Komenciĝis vera artileria batalado. La defendantoj de la Vintra Palaco ekfartis iomete malagrable. Jam antaŭ certa tempo oni estingis la lampojn ene de la palaco, por ne oferti celpunkton por la atakantoj. Foje-foje, vaganta kuglo pretersiblis niajn orelojn. Duonhoro pasis tiamaniere — ĝis kiam *Ĉudnovskij* anoncis telefone, ke la Vintra Palaco estas konkerita.

* * *

En oktobro ne amasiĝis centmiloj da homoj sur la stratoj, kiel en februaro. Ne flagris flagoj kaj afiŝoj kun sloganoj, ne aŭdeblis kanto, kriado; nek laŭta parolo de oratoroj ĉe la stratanguloj, aliflanke, nek sango fluis. La Petrograda revolucio postulis maksimume dek viktimojn; mortis ses sieĝantoj de la Vintra Palaco; sed neniu el inter la defendantoj.

László *Gyurkó*

Tradukis: Zsuzsa *Varga-Haszonits*

V. V. Majakovski

BONEGE

FRAGMENTOJ EL LA SESA ĈAPITRO DE LA EPOPEO

Blovis
kutime
oktobraj
ventoj,
kiel ĉiam
dum tempoj burĝaj.
Trans Troickij
tramojn
laŭ reloj-serpentoj
forblovis
bezonoj
urĝaj.
Sub la ponto —
Neva bril',
la maristoj
surrivere.
Baldaŭ gaja kugla tril'
ekŝancelos Zimnij-on[1] *vere.*
.....

La bruo ekstere
similas nun
bruegon
akvofalan.
Sed kiu altulo
je ĉiu fenestro
frapegis
per dura bastono?
Ektondris
ĉe la Petropavlovka nesto
ekpaf'
de tricola kanono!
Kaj post ĝi
eksplodas
ĉe l' urba kapo
jam
de „Aŭroro"[2]
sescola frapo.
Ankoraŭ
ne rekonsciiĝis
la ter'
pro la tondro
de ega skal' —
ĉe Petropavlovka
eklumis
lantern' —
de sturmo decida
signal'.
— Antaŭen!
Ataku!
Malgraŭ la baroj! —
Kaj jen
sub la oraj
plafonoj de l' car'
ĉiun ŝtupon
de ĉiuj
ŝtuparoj
oni
alpaŝis
trans la junkrar'.

La ĉambrojn
kvazaŭ
inundis oni,
torentis,
kunfluis
ĉirkaŭ perditoj
kaj ardaj kunbatoj
ne ĉesis resoni
ĉe la divanoj,
kurtenoj
kaj litoj.
En tiuj ĉambroj,
kie
relumis kronaj oroj,
ĉirkaŭis la monarkojn
gratuloj
kaj dorlotoj, —
tra la veluraj haloj,
resonantaj koridoroj
bruegas,
frapas
la kolboj kaj botoj.
Jen iu fripon'
konfuzita. Kaj lin
kiel la patro
riproĉas
proleto:
„Horloĝon
ne ŝtelu —
remetu tuj
ĝin —
havaĵo
popola,
knabeto!"
Puŝis,
pikis
la dektrion[3]
pli kreskantaj
botaj
frapoj.
Do kion
plu fari?
Utilan —
nenion!
Jam kvazaŭ
hakiĵo
super la kapoj.
Nur ducent paŝoj . . .
Nur dudek . . .
Kun krio
enkuras
junkro:
„Nur idiotoj
rezistus!"
— Ni cedu! —
kvikas la dektrio.
Tra l' pord' —
uniformoj,
tulupoj[4]*,*
kapotoj.

La Petrograda partizantaĉmento n-ro 1, kiu partoprenis en la revolucio ekde la unua momento

Kaj rompas
la silenton
per vere ŝtorma forto
baso marista,
tondro
sonora:
„Kiu ĉi tie provizoras?
For do!
Finita via tempo provizora!"
Kaj unu
nazumulo
per ordinara tono
eldiris
kvazaŭ ion
ne pretendantan je elstaro:
„Mi,
prezidanto de revmilitkomitato
Antonov
deklaras
eksigon
de Provizora Registaro."
En Smolnij[5]
l' amaso
triumfa kaj vasta
l' informojn
kovris
per himno majesta.
Anstataŭ:
„Ĝi estas
batalo lasta . . ." —
jam kantis oni:
— „Lasta
ĝi estas . . ." —
Ĝis tagiĝo
distanco
ne pli ol arŝino, —
brilas
la ruĝo
en la ĉielsino.

Kamarado Podvojski[6]
en aŭtomaŝino
diris lace:
„Al Smolnij . . .
Fino."
Jam ĉesis paroli
maŝinpafil'.
Finiĝis
la kuglaj
zumadoj abelaj.
Kaj antaŭ
la bajoneta
rebril'
paliĝis
la steloj —
gardantoj ĉielaj.
Blovis
kutime
oktobraj
ventoj
sen
ia ajn kataklismo.
Kuris
la tramoj
laŭ reloj-serpentoj,
jam —
dum socialismo.

El la rusa: *K. Gusev*

---

1. La *Vintra Palaco* de la caroj, nun ĝin okupas la bildgalerio Ermitaĵ.
2. Krozŝipo nun muzeo.
3. La provizora Registaro konsistis el 13 ministroj.
4. Mantelo el felo.
5. En tiu konstruaĵo laboris la stabo de la revolucio.
6. V. A. Antonov—Ovsejenko kaj N. I. Podvojski estris la taĉementojn, kiuj sturmis kaj okupis la Vintran palacon.

JOHN REED

la raportisto pri la Oktobra Revolucio

Ŝajnas kvazaŭ heroo de romantika verkisto, samtempe filo de la moderna, industria Usono; literatura talentulo kaj batalema revoluciulo, kavalire kuraĝa militraportisto kaj romantike mildkora poeto, haste ardanta sociaganto, brulkora amanto, admirita heroo de sia generacio, kies rapidema vivo arkis de riĉa Usona familio ĝis tombo honora ĉe muro de Kremlo.

Antaŭ 90 jaroj, en 1887 — jaro de la naskiĝo de Esperanto — en la Usona urbo *Portland* naskiĝis John *Reed* en familio de sukcesa entreprenisto, iam prokuroro ĉe tribunalo, kiu akre luktis kontraŭ finegocistoj. Lia patrino devenis de puritanaj pioniroj, kies familia moralo eĉ firmiĝis en la sentema junulo pro la tradiciojn gardanta edukado de bonaj lernejoj. John konvinkiĝis pri graveco respekti la ĉefajn virtojn de la „patroj" fondintaj ŝtaton —, la senperan, rektan karakteron kaj la neretireman sincerecon. Ricevinte la diplomon en Universitato *Harvard* (1910), li aventure veturis kun artisto-amiko sur kargo-ŝipo al Anglio, kie pro misaj hazardoj atendis lin senkulpan, malliberejo! Post klariĝo de la afero, li vagabondis tra la hispana lando, deproksime konatiĝante kun lumoj kaj ombroj de la popola vivo. Tiuj impresoj decide efikis je lia absorbema spirito, kiel liaj poemoj tie verkitaj konfesas tion.

Jam frue komenciĝis lia ĵurnalista kariero ĉe gravaj Usonaj magazinoj *(Globe, American Magazine).* La rapide akiritaj sukcesoj incitis lin iĝi milionulo, trovi riĉegan edzinon tamen la amikoj turnis lian atenton al la sociaj malsanoj de la lando. Li ekskribis pri la metropolaj mizeroj; la socialismaj tendencoj pli kaj pli altiris lian plumon, kaj baldaŭ li iĝis redaktoro de maldekstrema gazeto *The Masses* (La Amasoj). En 1914 eksplodis revolucio en Meksikio; grava revuo *Metropolitan* komisiis Reed veturi en la revolucian landon por kontinue raporti pri la okazintaĵoj. Lia senpereco kaj firma karaktero helpis lin interkonatiĝi kun la revoluciuloj, kun la stabo de generalo *Villa,* ankaŭ kun ties kontraŭloj inter la cirkonstancoj de la civitana milito. Liaj raportoj, plenaj de „interesaĵoj", buntaj historioj kaj sentoricaj impresoj kun artaj emfazoj akiris furoron, altan renomon por Reed. La poste famiĝinta ĵurnalisto, *Walter Lippmann* prijuĝis, ke „la raportaĵo mem, komenciĝis pere de John Reed!". (Tiuj raportoj aperis libroforme en *Insurgent Mexico,* hungarlingve en *Viva Villa!)*

Memkompreneble lin, la brilegan ĵurnaliston sendis al Eŭropo la revuo por komuniki pri la unua mondmilito. La inferaj teruraĵoj, viditaj de Reed, rapide klarigis por li la profundan veron: „Oni oratoras pri milito por la demokratismo kaj libereco, sed ni ne lasu trompi nin per tio. Senindulga, fia tumulto por la predo, jen la vero. Ne, — tiu ĉi milito neniel estas *nia* milito!" Li aludis per tio al la hejme kreskanta militismo, al intencoj tiri Usonon en la militon. Sekve de la sincertonaj, senvualigantaj artikoloj, la revuo rifuzis ilin plu publikigi (ties kolektaĵo aperis en volumo „La milito en Orient-Eŭropo", 1916). Post reveturo — krom eldono de soci-tendenca poemaro *(Tamburlaine)* — Reed jam aktive prenis sian parton en la socialismaj movadoj, kun radikalaj ideoj kaj per veraj agadoj: li organizis manifestadojn, strikojn, sekve li ofte estis arestita.

En 1916 li veturis denove al la Eŭropaj batalkampoj, nun jam kiel informisto por la socialisma *Call* (posteulo de la *Masses).* Tiel iĝis Reed atestanto, travivinto de la revolucia jaro 1917 en Petrogrado (Leningrado.) Li interamikiĝis kun la gvidantoj de la bolŝevikoj, akiris intiman amikecon ankaŭ kun *Lenin,* kaj sekvis kun plej granda atento la disvolviĝon de la politikaj eventoj, la orientiĝojn de la homamasoj, la ondojn de la revolucio. Post unu jaro li kunigis en libron la observitajn, siajn multajn konsentajn impresojn, kaj kun enkondukaj vortoj de Lenin, aperis lia ĉefverko: *„Dek tagoj, kiuj skuis la mondon."* La scenoabundaj, entuziasmaj raportaĵoj kaptas la leganton per la sobra tono, dum la enhavo servas pasie la revolucian idearon. Sendube, oni konsideras tiun libron la plej elokventa kaj persona dokumento pri la Granda Oktobra Socialisma Revolucio, pri ties fono kaj decidaj plej gravaj kaj karakterizaj etaj okazintaĵoj.

Kiam Reed en aprilo de 1918 revenis al Novjorko, jam falis sur lin kaj lian gazeton pezaj akuzoj pri „patrujperfido". Kvankam la tribunalo devis lin absolvi, malebligis lian ekzistadon la „nigra listo" sur literatura kampo. Tiom pli li ekagis en la politika batalo, kaj baldaŭ li iĝis unu el la estroj de la nove kreita Komunista Laborista Partio. Ties programon kaj manifeston redaktis la multon spertinta Reed, kiel ankaŭ la partian ĵurnalon.

Pro la pezaj cirkonstancoj Reed devis forlasi sian patrion. Li veturis denove al Ruslando, de kie reveni jam ne permesis al li la Usona registaro. Reed vokis sian amatan edzinon: venu renkontiĝi en Ruslando por tie vivi kune... Tragikece okazis ne tiel: 3 tagojn antaŭ sia tridektria naskotago, en aĝo de *Dante* („je l'vojomez' de nia vivo tera") — en plena forto, kaj fizike, kaj spirite — la tifo post kelktaga lukto finis lian vivon.

John Reed, aŭguranto de la mondrevolucio, ricevis sian lastan ripozejon inter la plejgranduloj de la amata revolucio ĉe la Ruĝa Placo de Moskvo, sub muroj de la Kremlo, apud la maŭzoleo de Lenin. En sia patrio pro lia vivo kaj verkaro li iĝis heroo, admirata de tutaj generacioj de la radikala inteligentularo: estis fonditaj John-Reed-Kluboj en multaj Usonaj urboj, kie kuniĝis la juna maldekstrularo, precipe literaturistoj kaj artistoj.

Ervin *Fenyvesi*

Berthold Brecht

LA TAPIŜTEKSISTOJ EL KUJAN-BULAK HONORAS LENINON

Ofte kaj malŝpare estis honorita kamarado Lenin.
Bustoj abundas kaj skulptaĵoj.
Urbojn laŭ li oni nomis kaj infanojn.
Okazis multlingvaj paroladoj,
kunvenoj kaj manifestacioj
de Ŝanhajo ĝis Ĉikago, honore al Lenin.
Jene tamen honoris lin la tapiŝteksistoj
el Kujan-Bulak,
eta vilaĝo en suda Turkestano:

Tie dudek tapiŝteksistoj vespere
la mizeran teksilon forlasas febrotreme.
Regadas febro: la stacidomon
plenigas la zumado de moskitoj kiuj densnube
leviĝas el la marĉo malantaŭ la kameltombejo.
Sed la fervojo, kiu
duonmonate akvon alportas kaj fumon,
iun tagon ankaŭ alportas la informon
ke alproksimiĝas la tago por honori Lenin,
kaj decidas la homoj en Kujan-Bulak,
tapiŝteksistoj, malriĉuloj.
ke ankaŭ en ilia vilaĝeto
gipsan buston oni metu, honore al Lenin.
Sed kiam kolektiĝas la mono por la busto,
ĉiuj staras
ŝancelaj pro febro kaj pagas
ŝvebmane siajn kopekojn pene akiritajn.
Kaj la ruĝarmeano Stepa Gamalev,
zorge kalkulante kaj bone observante,
vidas la pretecon honori Lenin kaj ĝojas,
sed ankaŭ li vidas la necertajn manojn.
Kaj subite li proponas
per la mono de la busto aĉeti petrolon kaj
ĝin disverŝi sur la marĉon malantaŭ la kameltombejo
el kiu la moskitoj venas, kiuj
la febron estigas.
Tiel oni luktu kontraŭ la febro en Kujan-Bulak, ĝuste
pro honoro al la mortinta, sed
neforgesenda
kamarado Lenin.
Tion ili decidis. La tagon de l' honorado ili
siajn kadukajn sitelojn, plenajn je nigra petrol', elportis
kaj, unu post la alia,
la marĉon per ĝi surverŝis.
Tiel ili utilis al si mem, honorante Lenin, kaj
lin honoris, ĉar ili utilis al si mem, kaj
pruvis ke ili ĝuste komprenis lin.

* * *

Ni sciiĝis kiel la homoj el Kujan-Bulak
honoris Lenin. Kiam nun vespere
la petrolo estis aĉetita kaj disverŝita super la marĉo,
viro ekstaris en la kunveno kaj postulis
ke oni metu tabulon ĉe la stacidomo
kun la informo pri l' okazintajo, ankaŭ entenantan
la ŝanĝitan planon kaj la anstataŭigon de la
Lenin-busto kontraŭ la febrodetrua petrolo.
Kaj ĉion ĉi honore al Lenin.
Kaj tion ankaŭ ili faris
kaj la tabulon metis.

Tr.: A. *Fernández*

РАБОЧІЙ и СОЛДАТЪ

Сегодня открывается Всероссійскій Съѣздъ.

Къ Гражданамъ Россіи

Временное Правительство низложено. Государственная власть перешла въ руки органа Петроградскаго Совѣта Рабочихъ и Солдатскихъ Депутатовъ—Военно-Революціоннаго Комитета, стоящаго во главѣ Петроградскаго пролетаріата и гарнизона.

Дѣло, за которое боролся народъ: немедленное предложеніе демократическаго мира, отмѣна помѣщичьей собственности на землю, рабочій контроль надъ производствомъ, созданіе Совѣтскаго правительства—это дѣло обезпечено.

Да здравствуетъ революція солдатъ, рабочихъ и крестьянъ!

Военно-Революціонный Комитетъ при Петроградскомъ Совѣтѣ Рабочихъ и Солдатскихъ Депутатовъ.

AL LA CIVITANOJ DE RUSLANDO!

La Provizora Registaro estas faligita. La ŝtata potenco transiris en la manojn de la organo de la Petrograda Laborista kaj Soldata Konsilantaro, en la manojn de la Revolucia Militista Komitato, gvidanta la proletaron kaj garnizonon de Petrogrado!

La afero, por kiu batalis la popolo: propono por tuja demokratia paco, likvido de la terposedado fare de grandbienuloj, laborista kontrolo super la produktado, kreo de Konsilantara (Soveta) registaro — ĉio ĉi nun estas certigita.

VIVU LA REVOLUCIO DE LABORISTOJ, SOLDATOJ KAJ KAMPARANOJ!

Tiun ĉi proklamon verkis Lenin, kaj ĝi estis eldonita — laŭ la malnova rusa kalendaro — la 25-an de oktobro 1917.



Piramido de la cara reĝimo

(Revolucia desegnaĵo el la jaro 1901)

Béla **BALÁZS**

PARENCOJ

Vintre de la jaro mil naŭcent kvardek du, proksime al *Voroneĵ, Iŝambajev,* leŭtenanto de la Ruĝa Armeo, havis strangan travivaĵon.

Iŝambajev, tiu kazaĥo el soveta Azio estis komisiita por priesplori la poziciojn de hungara regimento en iu arbaro. Fininte tiun taskon li ekiris reen al sia taĉmento, sed li paŝis en terkavon kaj lia maleolo elartikiĝis.

Li sentis fortan doloron ellevante sian piedon: lia bruna vizaĝo kun la elstaraj vangoostoj kaj mongoleskaj okuloj rigidiĝis. Ĉirkaŭe ĉie estas malamikoj, — — satelita armeo de *Hitler,* — kaj eĉ paŝi li ne povas!

Apenaŭ li konstatis sian danĝeran situacion, proksime la neĝo ekkrakis. Tie... malantaŭ la arbedo... Iŝambajev rekonis figuron de hungara soldato. La leŭtenanto elprenis sian revolveron kaj mallaŭte siblis: „Levu la manojn!"

Nur tiam la hungara soldato lin rimarkis. Tuj li forĵetis sian pafilon kaj levis supren ambaŭ brakojn. Dum li rigardis timeme tiun dur-vizaĝan mongol-okulan oficiron, kies kaptito li fariĝis, — lia timo iĝis pli kaj pli granda. Ĉu estas vero, kion la germanaj oficiroj asertas, ke la ruĝuloj mortpafas ĉiujn kaptitojn? Kaj aldone tiu ruĝulo eĉ estas duonsovaĝa aziano! Ĉu oni povas esperi komprenon aŭ indulgon de tiaspeca homo?

Dume la kazaĥo meditadis, kiel kaŝi sian senpovecon antaŭ la malamiko. Por gajni tempon li komencis demandadi:

„Kiu vi estas?"

„Studento el Budapeŝto" — aŭdiĝis la respondo.

„De kiu fakultato?"

„De lingvistiko."

„Ĉu tiu de la hungara lingvo?"

„Jes." La kaptito ne komprenis, por kiu celo servas tiu konversacio. Kion povas scii Azia sovaĝhomo pri filologio?

„Ĉu vi frekventis la lekciojn de profesoro *Németh?*" — daŭrigis la demandadon Iŝambajev.

Eĉ la spiro de la hungaro nun jam haltis. „Nature-nature!" — li balbutis. „Sed, de kie vi konas... ?"

Pala rideto laŭglitis sur la vizaĝo de la kazaĥo. Li mallaŭte respondis:

„Du monatojn antaŭ la eksplodo de la milito mi ricevis la lastan leteron. de profesoro Németh. Mi mem ankaŭ estas lingvisto, profesoro de Kazaha universitato en *Alma-Ata.* Mi studas la parencecon de la kazaĥa kaj hungara lingvoj."

Nun la kaptito de Iŝambajev ekkridetis.

„La radikoj de la hungararo etendiĝas al Meža Azio — li kajpesis. — „Tiel ni..."

Nikoao **HOHLOV**

1905
(Moskvo)

Mi memoras: fenestroj flamantaj
Sub la suno subira sangadis,
Kaj la stratoj, ebriaj pro kantoj,
Al la ruĝa liber' serenadis.

Iu forta la brakojn muskolajn
Disetendis por fojo unua
Kaj elĵetis malnovajn idolojn
El la templo per bato forskua...

Flirtis gaje skarlataj rubandoj,
Oron semis la suno vespera,
Kaj respondis al ĉies demandoj
Juna voĉo: libero, libero!...

Sed ekkrakis la pafoj — de kie? —
Ekbruegis eksplodoj tertremaj,
Kaj kun fajfoj de l' kugloj, orgie,
Ĉien flugis malbenoj kaj ĝemoj.

Freneziĝe, la homoj sin ĵetis
Post la niĉojn, al strataj anguloj,
Paŝis en tumulto, faletis,
Kun teruro en larĝaj okuloj.

Subite li ĉesis. Proksime iĝis susura bruo, kvazaŭ tiu de akvofalo. La hungaraj kanonoj komencis la atakon. Apud ili eksplodis grenado. La hungaro rapide kliniĝis al la tero. Ankaŭ la leŭtenanto ekprovis surteriĝi, sed ne sukcesis pro la dolora piedo. Lia kaptito nun devis rimarki la difekton de tiu piedo.

Minuton ili ambaŭ silentis. Poste la studento ekparolis mallaŭte: „Laŭ profesoro Németh la kazaĥoj kaj la hungaroj estas parencoj. Se vi ne povas iri, permesu, ke mi helpu vin."

Jam vesperiĝis, kiam la ruĝsoldatoj kuris al la korpusestrarejo por rigardi la strangan scenon: hungara militkaptito portis surdorse la sovetan oficiron, kiu lin kaptis.

„Kiu vin portis Iŝambajev?" — ili demandis ridante.

„Parenco" — sonis la trankvila respondo.

Tr.: L. *Rieth*

Béla Kun gvidis la movadon de la hungaraj militkaptitoj en Ruslando dum la jaro 1918. En la sekva jaro li estis jam gvidanto de la unua hungara proleta ŝtato

Tibor Szamuely kaj Ferenc Münnich utiligis la spertojn, akiritajn en Ruslando por elbatali liberecon kaj socian justecon por sia lando

INTERNACIISTOJ POR LA OKTOBRA REVOLUCIO

András Gyula Varga, regimentestro de internaciistoj

La 3-a regimento de internaciistoj apud Kievo en 1920

Gáspár HELTAI

LA ENFERMÍTA REĜEDZÍNO

Estiss iam ríĉa rèĝo kiu prèniss al si tre bèlan edzínonn. Kaj pri tiu li estiss tiel ège ĵalúza, ke en sia korto, apud la pordègo, li farígiss bèlan ampleksan túronn, kaj fermiss sian bèlan edzínonn en ĝin, kaj la ŝlosilojn de la túro li ĉiutempe portádiss en sia póŝo. Kaj la edzíno tre malĝojádiss pri tio. Kaj dumtáge ŝi rigardádiss al la stráto en la urbo, kaj sidante en la fenestro, tie ŝi kudrádiss.

Kaj vèniss en la kortègonn de la rèĝo iu belstatura eminenta bravúlo serĉanta servonn. Kaj kiáme li preteríruss la túronn kun siaj servistoj, ekvídiss lin la sinjoríno reĝedzíno, kaj ekscitíĝiss ŝia kóro per ámo al la bravúlo; kaj ŝi komenciss tusádi en la fenestro. La bravúlo , awdante la tusádonn, suprenrigardiss al la fenestro; kaj vídiss tie la sinjorínonn reĝedzínonn. Kaj ège tre li mirádiss pro ŝia belèco, kaj lia kóro komenciss ekscitíĝi per ámo al ŝi. Kaj depreninte sian kaskèdonn kaj fleksinte siajn genúojn, li íriss de tie for.

Enirinte pro tio la bravúlo al la rèĝo, li ofèriss sian servádonn al la rèĝo. Díriss la rèĝo en si:

— Eminentstatúra hómo estass ĉi tiu; certe post tempo mi povoss prèni utílonn de li.

Kaj li prèniss la bravúlon al dudek kvin ĉeváloj.

Kaj li kondutádiss tre frèŝe, kaj estiss diligenta pri la eltrovádo de la dezíroj de la rèĝo. Sed ĉiutempe li irádiss tien-reen sub la fenestro de la túro por sin dezirígi. Kaj la sinjoríno reĝedzíno preskaŭ formortiss por li. Sed nenimanière íli póviss kontrawokulíĝi. Foje do, ke li estiss iranta sub la fenestro, la sinjoríno reĝedzíno montriss al li la maldekstran cicètonn kaj jètiss al li paperètonn el la fenestro. Kaj en ĝi ŝi priinstrúiss la bravúlonn, kionn li fáru, ke íli póvu íĝi okúlo-kontraw-okuló.

Foje la rèĝo senatendíte elíriss por ĉási. Kaj estiss neniu, kiu elíriss kun li, nur la kortègaj servistoj. Díriss la rèĝo survoje:

— Mi ne scíass, kie miaj sinjóroj irádass, ke neniu, vénass kun ni. Eĉ mia bravúlo ne estass ĉi tie.

Ĝuste ĉitempe vèniss la bravúlo.

Díriss la rèĝo:

— Malfrúe vi vènass post mi.

Díriss la bravúlo:

— Majesta Moŝto! Tio ne estass kulpo nia, sed tiu de la hopmajstro (ceremoniestro), kiu ne disdíriss al ni, ke via majesta moŝto vólass elvèni por ĉasado. Certe estuss tasko lia lóĝi ja en la kortego, kaj senĉese gardi vian moŝton, kaj ĝustatempe anonci al la bravúloj la vólon de via rèĝa moŝto. Tiel ili povuss sin prepári, ke ĉiáme ili ĉeestiĝuss en tempo.

Díriss la rèĝo:

— Úlo por nenío estass tiu hopmajstro. Pro tio denúne estu vi mia hopmajstro. Do farigu al vi dómonn en la korto kie ajn, kie vi vólass.

Kiáme íli hejmenníriss por tio, la bravúlo, la nova hopmajstro, tujbaldáwe vokigiss la masonistojn kaj la ĉarpentistojn, kaj instrukcíis ílinn konstrúi al li dómonn apud la ĉepordèga túro; kiel lin la reĝedzíno antaŭe priinstrúiss en la paperèto. Kaj kiáme ili komencuss konstruádi, vèniss la rèĝo kaj díriss:

— Vi konstrúass la dómonn al tre malnobla lóko.

Respondiss la bravúlo, la nova hopmajstro:

— Majesta moŝto, ĝi estoss en tre bóna lóko ĉi tie: ĉar preskaŭ en la pordego. Kaj de ĉi tie mi póvass atenti la tútan korton kaj ĉiutempe mi póvass rimarki kiu en-kaj elírass.

Díriss la rèĝo:

— Ja estass bóne.

Do li konstruígiss la dómonn apud la túro, ke unu múro de la túro iĝiss unu longa múro de lia dómo.

Kaj kiáme la dómo estiĝuss prèta, li delásis ĉiujn la masonistojn, escepte de unu, kiun li envókiss al la lasta volbèjo kaj díriss al li:

— Ŝatáta mia amíko. Mi hávuss farendâjon, kiun mi dévuss konfídi al vi, se vi hávuss honeston kaj vóluss ĝismorte silenti. Kaj mi dónuss al vi grandan donácon.

Respondiss la masonisto:

— Mi hávass honeston.

Kaj li ĵúriss al la hopmajsro, ke li vóluss ĝismorte silenti.

Kaj li díriss:

— Ĉu vi vídass: ĉilóke vi tratrúu la múron, ke únu hómo póvu en-kaj elŝovíĝi tra ĝi.

Kaj la masonisto tuj ĝin tratrúiss. La hopmajstro dóniss al li unu ormonèron, kaj tiel lin forsendiss.

Kaj la hopmajstro enŝovíĝiss la túronn al la sinjoríno reĝedzíno. Kaj tie ili forte ĉirkawprenádiss unu alían kaj ludádiss unu kun alía. Kaj kiáme íli satíĝiss, la sinjoríno reĝedzíno dóniss unu orringon donáce al la hopmajstro, ke ĝi estuss la signo de ŝia amo. Kaj la hopmajstro denóve elŝovíĝiss el la túro al sia dómo. Kaj la sinjoríno reĝedzíno pendígiss unu grandan tapíŝonn antaŭ la trúonn.

Kaj tiun ĉi plezurègan lúdon ili farádiss ofte unu kun alía, la hopmajstro kun la sinjoríno reĝedzíno.

Okáziss foje, ke la rèĝo elíriss por ĉási. Kaj kiáme ili jam longe ĉasáduss en la varmègo, ili deĉevalíĝiss apud iu arbáro. Kaj kiáme tie en la ombro ili ripózuss, fordormiss la hopmajstro sur la herbotapíŝo apud la rèĝo. Kaj kiam li etenduss la brákon, la rèĝo ekvídiss sur la fingro, de la hopmajstro la ringonn, kaj li rekóniss la ringonn, ke ĝi estuss, kiun li mem dóniss al la sinjoríno reĝedzíno je la unua kundormiĝo. Kaj li díriss al la hopmajstro:

— Kie vi prèniss ĉi tiun ringonn? Ankaw mi háviss iam same tian ringonn.

Respondiss la hopmajstro:

— Unu el miaj fratínoj dóniss ĝin al mi donáce por eterna memóro.

Kiam ili plu ĉasáduss, díriss la hopmajstro al siaj servistoj:

— Se la rèĝo demandass, kien mi íriss: díru al li, ke post la dormo la malvarmo komencis min tremígi, tial mi íriss hejmen.

Kaj tuibaldáwe li eníriss sian dómonn, kaj enŝóviss sin en la túronn al la sinjoríno reĝedzíno, kaj díriss:

— Mia amáta kóro, la rèĝo ekvídiss la ringonn sur mia fingro, kaj demandiss, kie mi ĝin prèniss. Kaj díriss, ke li háviss iam sáme tian ringonn. Mi tímass, ke hejmenveninte li eĉ komencoss antawenpeti de vi la ringonn. Prènu do ĝin kaj remètu.

Kaj la sinjoríno reĝedzíno remètis la ringonn en kestonn.

Kiáme la rèĝo hejmenvènuss, kaj la sprónojn demetuss, tujbaldáwe li íriss supren al la túro, kaj malferminte la pordojn, díriss al la sinjoríno reĝedzíno:

— Mia amáta edzíno, antawenportu al mi la ringonn, kiun mi dóniss al vi je la unúa kundormiĝo, ke ĝi estuss la poreterna signo de mia bonvolo al vi.

Díriss la sinjoríno reĝedzíno:

— Kion fáross via moŝto pri ĝi?

Respondiss la rèĝo:

— Mi ĝója ĝin ekvíduss.

Kaj la sinjoríno reĝedzíno foríriss al la kesto, kaj malferminte ĝin, ŝi elprèniss la ringonn, kaj dóniss ĝin al la rèĝo. Vidante la rèĝo la ringon, li díriss:

— Certe ja mi vídiss sáme tian ringonn sur la fingro de la hopmajstro; kaj mi krèdiss, ke ĝi estuss ĉi-ringo, kaj mi fáliss en dúbbon pri vi. Ja certe mi ekkolèriss pri vi, sed mi pètass, pardónu tion.

Kaj li elíriss el la túro.

Post tioj-ĉioj vèniss iaj eminentaj personoj el la patrolando de la hopmajstro al li, kaj li farígiss al ili bravan tagmanĝonn. Kaj li pètiss la sinjorínonn règedzínonn, ke ankaw ŝi estuss tie kun la gastoj kaj amuzíĝuss kun ili. Kaj kiáme la gastoj alvènuss, vèniss ankaw la sinjoríno reĝedzíno, vestita en bèlan tualètonn, kaj komencis kúne amuzíĝi kun la gastoj.

Kiáme la rèĝo awduss la flutsónojn, demandiss siajn servistojn: kiu afero tio estuss? Ili díriss al la rèĝo: „Eminentaj persónoj, vèniss al la hopmajstro el lia patrolando, kun ili li núne amuziĝass."

Díriss la rèĝo:

— Nu, ankaw mi tien írass, kaj amuzíĝoss kun ili.

Kaj tuj li ekíriss. Kaj kiáme li envènuss la dómonn, suprensaltiss la hopmajstro, kaj sidígiss la rèĝonn apud la gastojn. Kaj la sinjoríno reĝedzíno prèniss kapónon el la pládo, kaj mètiss ĝin antaw la rèĝonn, kaj díriss:

— Majesta moŝto, via moŝto manĝu kaj amuzíĝu kun ni.

Li alrigardiss ŝin kaj ekmirádiss pri ŝia belèco, kaj pensiss: certe tio estas bela viríno, same tia, kia estas mia edzino.

— Kiu estas ĉi tiu viríno?

Respondiss la hopmajstro:

— Majesta moŝto: mia amatíno kaj kolombo.

Kaj li ne póviss sufiĉe ŝin rigardi.

Kiáme la tagmanĝo konsumíĝuss, baldáwe la rèĝo ekstáriss. Kaj petègiss la hopmajstro al la rèĝo, ke li vólu plu amuzíĝi; sed la rèĝo díriss:

— Estass neeble, ĉar mi hávass grávan farendon.

Kiáme li komenciss malrapíde malsupreníri sur la ŝtupáro: la sinjoríno reĝedzíno eníriss la volbejon, kaj ŝi ŝóviss sin en la túronn tra la trúo. Kaj ŝi senvestíĝiss, kaj tuj surmètiss ĉiutágajn vestojn.

Kaj eksídiss al la fenestro, kaj komenciss kudrádi. Intertempe alvèniss la rèĝo al la túro, kaj ège li alrigardádiss la serúrojn: kaj li tróviss ĉiujn sendifektaj. Kaj enirinte la túronn, li tróviss tie la sinjorínonn reĝedzínonn, ke ŝi kudráduss en la fenestro. Kaj li komenciss ĉirkaŭbrakumádi ŝin, kaj díriss:

— Mia amáta edzíno, pardónu, ĉar mi íĝis dubháva pri vi. Ĉar mi estiss hodiaw ĉe la hopmajstro, kaj li alportiss tien ankaw sian amatínonn. Neniáme en la vívo mi vídiss, ke unu virína besto estuss tiel simíla al la alía, kiel tiu estiss al vi. Mi ekstáris, ke mi suprenvènu, kaj vídu, ĉu támen vi estass ĉi tie. Mi pètas vin, pardónu.

Kaj díriss la sinjoríno reĝedzíno:

— Tio ne estass granda miraklo, ĉar únu hómo estass simíla al la alía.

Kiáme ĉi tiun lúdon jam faráduss dum kelkaj jároj la hopmajstro kun la sinjoríno reĝedzíno, ili interkonsilíĝiss, ke ili vóluss foríri unu kun alía al la partolando de la hopmajstro. Kaj la hopmajstro eníriss al la rèĝo, kaj díriss al li:

— Majesta moŝto! Jam estass ne malmulte da jároj, ke mi fidèle serviss vian moŝton: mi petègass al via moŝto, ke jam delásu min hejmen, ĉar mi dèvass ekzorgi pri mia heredáĵo kaj gento.

Díriss la rèĝo:

— Restu, jen mi dónass al vi bièonn kaj servistojn.

Respondiss la hopmajstro:

— Via moŝto ja dóniss al mi sufiĉe. Mi pètass nur unu afèronn de via moŝto.

Díriss la rèĝo:

— Mi dónass, kion ajn vi pètass.

Díriss la hopmajstro:

— Via moŝto dónu al mi skribon, ke mian amatínon, kiun via moŝto vídiss en mia dómo, mi libère forportu kun mi hejmen.

Díriss la rèĝo:

— Prenu ŝin libere.

Kaj la hopmajstro forordígiss la trezóronn de la sinjoríno reĝedzíno kaj sian kolektitan propran trezoron al la ŝípo. Poste adiáwon dirinte al la rèĝo, li kunprèniss la sinjorínon reĝedzínonn al la ŝípo, kaj ekiriginte la ŝípon, ili tuj forvetúriss.

Ĉe mateníĝo, la rèĝo supreníriss al la túro por amuzíĝi tie kun sia bèla sinjoríno reĝedzíno. Kaj kiáme li malfermuss la túronn: do estiss nur ŝia loko. Kaj kiáme en la túro li dise serĉáduss, kaj la tapíŝon forlèvuss, li vídiss la grandan trúon, tra kiu ili en- kaj elirádiss. Kaj túje li komenciss plóri kaj vèi, kaj la hopmajstron malbèni: sed váne.

Tr.: O. *Haszpra*

KOMENTO

LA ENFERMITA REĜEDZINO estas unu el la pecoj de la unua hungarlingva novelkolekto, aperinta en 1572 en *Kolozsvár (Koloĵvar),* nun Cluj (Kluĵ) en Rumanio (Transilvanio).

Por sentigi al la esperantista leganto la arkaikan guston de la kvarcentjara hungara teksto, ni uzis la sekvajn rimedojn: 1. verbofinaĵo: *-ss,* 2. akuzativa finaĵo de substantivo: *-nn,* 3. longaj akcentitaj vokaloj: *á, è, í, ó, ú* (escepte de la regulaj tabelvortoj, numeraloj kaj pronomoj: unu, iam, ili), 4. ŭ = *w,* 5. certaj vortoj, ĉefe adverboj estas uzataj en redundanca*, plilongigita formo (kiáme, ĉiutempe, tujbaldáwe, ĉeestíĝuss). Ĉi tiuj karakterizaĵoj (literduobligo, iom komplika supersignaro, litero alia ol nun por iu sono, pli longaj vortoformoj) aperas ne nur en la malnovaj hungaraj, sed ankaŭ en alilingvaj skribaĵoj. Koncerne la stilon, ni klopodis rekrei ĝin tiaefika, kia estas la originala, do se kelkloke (vere ne multloke) la leganto trovas iom malfacilajn, ne tuj kompreneblajn strukturojn, li devas scii, ke la hungara leganto havas tie la samajn malfacilaĵojn. Tamen prilukti ilin estas speciala ĝuo.

**redundanca:* superfluanta, superflua, nenecese longa, trokvanta.

MULTPROMESA INICIATO

La Budapeŝta Teritoria Komitato, kaj la Virina Komitato de HEA la 8-an kaj 9-an de oktobro aranĝis la 1-an esperantlingvan tutlandan deklamkonkurson honore al la 60-a datreveno de la Granda Oktobra Socialisma Revolucio.

La organiza Komitato ricevis grandan helpon de la esperantista grupo de la fabriko Ganz-Mávag, kiu donis la ejon, faris afiŝojn, propagandon, eĉ ofertis krompremiojn al la konkursantoj.

En la kategorio A partoprenis 17 plenkreskuloj, plejparte gejunuloj; en kategorio *B* deklamis 21 gelernantoj de 10 ĝis 15 jaraj kaj en la kategorio *C* ni ĝuis la prezentadon de 8 malgrandaj pioniretoj ĝis 10 jarojn aĝaj.

Ĉe la *A* kategorio *Zoltán Gera,* rekonata aktoro de la budapeŝta Teatro Mikroszkóp estis la prezidanto de la ĵurio, kaj ĉe la infanoj d-ro profesoro *Ferenc Jáki.*

La ĵurio ne aljuĝis la unuan premion en la kategorio *A;* la duan premion ricevis *József Kirsch,* gimnaziano el Kecskemét kaj la trian *Bernadette Mihályi,* Boly. En la kategorio *B* la premiitoj estas: 1-a *Judit Szakos,* 2-a *Erika Kőhegyi,* ambaŭ el Szirmabesenyő, 3-a *Julianna Kámán,* Zalaegerszeg. En la kategorio C la premiitoj estas: 1-a *Zsuzsa Sulcz,* Budapest, 2-a: *Zsuzsa Rátkai,* Szeged, *György Magda,* Kál.

Tivadar Kereszthegyi

HARFLEGAJ GUTOJ „SZILAS"

Por sekaj haroj

Harflegaĵo havanta vegetaĵajn efikokomponantojn. Ne medikamento, tamen per ĝia sistema uzado oni povas anticipi kaj ĉesigi malagrablajn har-misformiĝojn (harrompiĝo, fendiĝo, senbrileco). Ĝi ne kaŭzas haŭt-iritadon, nek alergion, trosentemon.

HAJÁPOLÓ CSEPP „SZILAS"

Por grasaj haroj

GRAVA KONDIĈO DE LA KULTURITA EKSTERAĴO ESTAS LA PURA, LA BONE FLEGITA HARARO, ATINGEBLA SOLE PER SISTEMA PRIZORGADO.

Aparta preparaĵo por seka hararo

Aparta preparaĵo por grasa hararo

HAJÁPOLÓ-CSEPP „SZILAS"

Uzebla propramane, kiel hejma harflegilo

Kelkminuta milda frotado, masaĝo per la gutoj, ripetenda po 2-3 tagoj

Per sistema uzo ĉesas la malagrablaj simptomoj, la hararo rericevas sian belon, brilon

Fabrikas:

„SZILASMENTI" MGTSZ

Laboratorio de Kuracplanto-prilaboro kaj de Volatilaj oleoj

H-2144 KEREPES

István NEMERE

MURTAPIŜO

Tiutempe mi okupiĝis pri teksado de murtapiŝo. Unue ili permesis tion. Poste ili komencis primoki, ĉikani min pro tio. Fine eĉ malhelpi. Sed mi ne ĉesis.

Iutage ili diris: ni ne havas manĝon, iru labori. Mi respondis, ke mi teksas murtapiŝon. Ho, vi vendos ĝin, kaj ricevos multe da mono! — demandis ili. Ne demandis, sed eĉ asertis. Mi ne vendos ĝin, ĉar ĝi estas farata por mi mem — mi respondis —, mi volas havi ion belegan en tiu domo, kiu estos iam la mia. Stultaĵo — ili diris —, vi malsatmortos, se vi faras nur tion.

Frumatene mi eliradis al la marbordo, kaptadis krabojn, kaptadis kaj portis ilin al vendoplaco. Mi vendis ilin por malmulte da mono kaj tiom sufiĉis por unu tago. Kiam la suno leviĝis alten, en ombro mi teksis plu la murtapiŝon.

Mi enteksis multajn kolorojn — ĝi fariĝis ĉiam pli bela. Ĝi prezentis unusolan, grandan floron — mi nomis ĝin la floro de la Suno. Oranĝflava, trairanta el fajroblanka al sunkolora, etendataj flambrakoj, radiantaj petaloj. Kaj ruĝa fono.

Miaj fratinoj ĉiuvespere staradis sur stratanguloj. Miaj fratoj forveturis ien per fiŝkaptistaj barkoj.

Mi teksis la murtapiŝon.

Mia patrino mortis, la rigardo de mia patro fariĝis nenionvidanta; tuttage li ridetis, ridaĉis.

Mi teksis la murtapiŝon.

Unu el miaj fratinoj mortigis sin, la alia malaperis. Nian domon iunokte trafis fulmo, ĝi bruliĝis. Mi elsavis la murtapiŝon, mia patro mortbruliĝis interne.

Mi teksis.

Jam nur la vento estis mia malamiko. Mi sidis sur alta roko, la vento ŝiradis la fadenon el miaj manoj. Sed antaŭ ol ĝi venkis, la murtapiŝo pretiĝis.

Belega ĝi estis. Mi admiris ĝin.

Neniun mi havis al kiu mi povus montri ĝin.

Tamen treege ĝi plaĉis al mi.

MI, LA MURDISTO

Duobla murdisto mi estas.

Kiam mia edzino la unuan fojon venis al mi kaj diris, mi tuj respondis: iru, forigu ĝin. Ja ni ne povus lin vivteni se ĝi naskiĝus...

Ŝi iris kaj forigis ĝin. Longe poste ŝi estis silentema, senhumora. Ankaŭ mi.

Kiam duafoje okazis la samo, longe ni paroladis pri tio. Kune ni decidis mortigi lin. Ĉar, se li naskiĝus... Pala ŝi foriris, duonsvenintan mi veturigis ŝin hejmen. Denove ni parolis pri li, pri ili. Ni bedaŭris.

Ekde tiam ofte mi pensas pri ili. Kio estus okazinta, se tamen? Kiu el ili estus kreskinta el trikilograma hometo al granda viro? Ĉu ambaŭ estus knaboj, aŭ nur unu el ili knabo, la alia knabino? Verdokulaj, blondaj aŭ brunharaj?

Nokte ofte mi ne dormas. Mi kuŝas kun okuloj larĝe rigardantaj la malhelon. Ekstere vento kuradas de foliaro al foliaro. En mi la terura malcerteco, jam neniam forigebla: kion ili estus demandintaj post kvin jaroj, kiel ili karesus mian vizaĝon, ĉu ili estus plorontaj ĉirkaŭ mia lito — lastatage?

Bone estus fingre kombi inter la haroj de la knabo, tranaĝi la riveron kun la knabino, pilkludi, montri al ili la neston de merlo surarbe, bruniĝi sub suno...

Mi kuŝas, sekokule. Apude dormas ŝi. Amas min. Kaj mi — ŝin. La tempo pasas, malproksimiĝas de ni tiuj du mortuloj.

Ilia morto liberigis min de timego. Nun tamen estus bone, se ili vivus. Se ili snufus tie, en la dua ĉambro. En ĉambro jam por ĉiam malplena.

Vento kuradas en la ĝardeno. Estas malvarme. Tre malvarme.

PANORAMO — P

Krom la famaj ĉefurbaj srandbanejoj ankaŭ en la suburboj troviĝas bele ekipitaj, agrablaj strandbanejoj. Sur la bildo estas unu el la basenoj de la banejo de Csillaghegy.



Miloj da turistoj vizitadas en la semajnofinoj la Fortikaĵon de Visegrad apud la pitoreska Danubangulo

La Fremdultrafika Mondorganizo, en Hispanio, en la urbo *Torremolinos* aranĝis la duan ĝeneralan kunsidon, kiun partoprenis 93 landoj. La komitato elektis novan estraron, kies vicprezidanto iĝis la hungaro István *Szurdi*. La konata hungara fakulo jam ekde jaroj estas prezidanto de Hungarlanda Fremdultrafika Konsilio.

* * *

Pliboniĝis la restadeblecoj ĉe la lago Balatono, kvankam ĉijare la nombro de turistoj altiĝis cirkaŭ je 30 procentoj. Plivastiĝis la reto de riĉe provizitaj vendejoj kaj restoracioj. En *Balatonföldvár* jam ĉisomere funkciis la novaj hoteloj *Neptun* kaj *Expressz*, kun 670 litoj. Diversloke ankoraŭ 1400 novaj lokoj servis la turistojn. Krom tio dise en la tuta lando ĉiam konstruiĝas la novaj ripozejoj kaj hoteloj, ekzemple en Hajdúszoboszló oni konstruas tri ripozdomojn kun 2000 litoj, apud la granda banejo, kies saniga akvo kaj la restoracioj kun hungareca gastamo atendas la bangastojn.

* * *

Dum la somero ankaŭ nia ĉefurbo Budapeŝto pretiĝis por akcepti la turistojn. Ĉiam estis plenpenaj la kuracbanejoj *Gellért, Széchenyi, Lukács, Rudas kaj Dagály* por kuraci la reŭmatismon. La strandoj kaj naĝejoj en la urbpartoj *Csillaghegy, Csepel, Római, Pünkösdfürdő, Pestlőrinc, Kispest, Cinkota, Rákoscsaba, Albertfalva, Pesterzsébet* ktp. plibeligitaj kontentigis ĉiun pretendon, inkluzive ankaŭ la instruadon de naĝado kaj la pruntedonon de diversaj strandamuziloj. La Trafika Entrepreno en la semajnfinoj per 100—150 kromaŭtobusoj helpis la ekskursantojn al la strandoj kaj al montoj kaj arbaroj. Sur la Danubo 16—20 ŝipetoj servis la ŝatantojn de la naturo. La Ĉefurba Ĝardenkultura Entrepreno 2 milionojn da floroj plantis sur la stratojn kaj placojn, denove farbis 22 mil benkojn kaj en bona stato funkciigis 113 fontanojn. La ludplacoj por la infanoj estis instalitaj per diversaj ludiloj. Unuvorte la Ĉefurba Konsilantaro bone zorgis pri la amuzado de la gastoj kaj de la loĝantaro.

* * *

Ĉijare la socialismaj landoj pariĝadas por la solenado de la Granda Oktobra Revolucio, kiu okazis antaŭ 60 jaroj en Sovetunio. Inter aliaj landoj Hungario kun pli grandaj produktado kaj laboro deziras kontribui al la solena datreveno. En Budapeŝto la laboristoj de grandega Fero-kaj Metalindustria Uzino „Csepel" iniciatis alvokon al ĉiu fabriko de la lando por fari laborkonkurson pri pliproduktado. Krom la produktaj rezultoj de loboristoj ankaŭ la larĝa tavolo de loĝantaro plenumis senpagan volontulan laboron por honori la datrevenon. En la Budapeŝta 20-a distrikto, la loĝantaro decidis, ke ili plibeligas la propran loĝkvartalon. Centoj da homoj kolektis la defalaĵojn, bruligis la herbaĉon, reordigis la ludplacojn por la infanoj. En la 19-a distrikto la loĝantaro faris kontrakton kun la Konsilio, ke dum 5 jaroj ne estos troveblaj malpuraĵoj sur la stratoj. Antaŭ siaj domoj, en la parkoj ili plantas florojn kaj arbojn kaj ili konstante gardas la integrecon de la parkoj kaj ludplacoj kontraŭ difektantoj. Ĉijare la valoro de socia laboro superis milionon da forintoj.

* * *

Dise en la tuta mondo altiĝas la trinkado de alkoholaĵo. Hungario es-

Malgraŭ la ĉiam kreskanta fremdultrafiko la bordo de Balatono ne perdis ankoraŭ sian originan ĉarmon

Unu el la grupoj de Hun[g]bila-ripozejo" apud Dobo[g] instaladis, plibeligis la ĉir[k]



NORAMO

tas ankaŭ avangarda en tiu tereno. Tiu noca pasio kaŭzas multajn sociajn problemojn. La lukton kontraŭ la alkoholismo servas interalie la plialtigo de laktoproduktado. En la tuta lando unu post alia konstruiĝas la plej modernaj bovin-staloj, eĉ la ŝtato kontribuas al la elspezoj de individua bredado. La landa mezvaloro de laktoproduktado estas ĉiujare po bovino 2768 kg sed la maksimumo en kelkaj kooperativoj jam atingis la 4772 kg-ojn, ĉar pliboniĝas la specosortimento de la bovinoj kaj la higienaj kondiĉoj. Nuntempe konstante konstruiĝas la novaj modernaj laktaĵproduktejoj kaj elegantaj laktovendejoj. Ĉijare la laktoproduktado estis pli ol 2 miliardoj da kilogramoj, do ĉiu persono konsumis 200 kg-ojn.

* * *

La alia grava dispono estas por la moderna nutrado de la loĝantaro la altigo de la kvanto de bestprodukta-ĵoj. Nuntempe la porkoetato estas 8 milionoj, ĉi-jare ĉiu persono manĝis 80 kilogramojn. En urboj *Budapeŝto, Szeged, Gyula, Miskolc, Pécs* kaj en aliaj lokoj konstruiĝis grandegaj viandprilaboraj uzinoj por produkti viandfaraĵojn. La bredado de kortbirdaro superis ĉijare la bezonojn de la loĝantaro tial oni eksportis 12 mil vagonojn da kortbirdoj. La bredado de buĉbrutoj, ŝafoj kaj kunikloj simile progresis.

* * *

En Sudhungario ĉe la piedo de montaro *Mecsek* situas la malnova, belega urbo *Pécs*. Ĉi-somere miloj da turistoj vizitis la urbon kaj la montaran regionon. Preskaŭ ĉiutage okazis alia programo. Ekzemple: koncerto, belarta-kaj fotoekspozicio, teatra prezentado, popoldanco, filmprezentado ktp. Precipe la muzika programo estis varia. En la kvartura, romanika katedralo plurfoje okazis orgenmuziko, en la romantikaj hoteloj *Minaret* kaj *Fenyves*, kaj en la plej nova luksa hotelo *Pannonia* muziko agordis la gastojn, sur la korso preskaŭ ĉiuvespere la diversaj blovorkestroj prezentis koncertojn.

* * *

La teknika evoluo, la rapidtakta urbanizado nocas la aeron. La urbanoj dum semajnfinoj rifuĝas en arbaron por enspiri freŝan aeron. Plej ofte oni ekskursas per komfortaj aŭtoj, tiel la langvoraj, homaj muskoloj tute ne fortiĝas. Eĉ sur la arbaraj vojoj oni enspiras la benzingason de la multaj aŭtoj. Norde de urbo *Veszprém* situas la arbarego *Bakony*, kie la Hungara Aŭtoklubo, la Veszprem-a Arbarmastrumado kaj la Bakony-a Administrejo kune estigis ripozejon por la aŭtoj. El la ŝoseo betonvojo kondukas al la senarbejo inter la pinarboj, kie benkoj, balaaĵujoj, lardofritiloj, trinkakvo estas troveblaj. Ĉie estas surskribo: „Lasu la aŭton sola kaj iru piede en la arbaron!" En la arbaroj de *Bakony, Mecsek, Bükk* jam estas pretaj la aŭtoripozetoj en la lokoj: *Farkasgyepű, Tündérmajor, Sümeg, Kádárta, Pénzesgyőr, Szömörke, Oltárkő* kaj *Szarvaskő*, kie miloj da homoj povas ĝui la vere freŝan aeron kaj movi la malfortiĝintajn muskolojn.

Komp. Szilárd *Bálint.*

Infanoj kaj maljunuloj ofertis dimanĉon por volontula laboro kaj estigis parkon en sia loĝkvartalo

oklubo entreprenis protektadon pri „aŭtomo-a montaro Pilis. Okaze de grupa ekskurso ili le la parkejo.

En la proksimo de la ĉefurbo jam romantikaj arbaraj montoj-valoj atendas la turistojn kaj dise en la densa arbaro agrablaj senarbejoj por komforta ripozado



MEDICOR MEDICOR

MEDICOR MEDICOR

La instrument-grupoj de MEDICOR kun tiposigno KTD kaj LTD, krome diversaj kombinaĵoj de tiuj kaj de iliaj komplementaj unuoj formas tian polifunkcian novan diagnostikan sistemon, en kiu la mezur-unuoj estas mendeblaj por diversaj kunmetaĵoj. La membrojn de la instrument-grupo oni aplikas en la plej ĝenerala kuracoservo, ambulanco, amasa elimina ekzameno, hospitalaj aplikadoj kaj medicinaj esploroj, — preskaŭ sur ĉiu tereno de medicinaj sciencoj. La diversaj unuoj estas fabrikitaj en modulsistemo, ĝiaj variaĵoj formas la deziratajn aparatojn.

MEDICOR BUDAPEST



MEDICOR MEDICOR

MEDICOR MEDICOR

MEDICOR MEDICOR



MEDICOR BUDAPEST

Pli oftaj mezurmuntadoj: KTD–1 por mezuri ĝeneralajn fiziologiajn parametrojn; KTD–2 por mezuri ĝeneralajn fiziologiajn parametrojn, kun EKG senpera skribilo; KTD–3 por pulmdiagnozaj (spirmuskola funkcio kaj spirometriaj) ekzamenoj; KTD–4 distrikta kuracista celmuntaĵo; KTD–5 muntaĵo por gravedsondado (ultrasona ekzameno de feta »korfunkciado«); KTD–11–F por psikofiziologiaj esploroj (ebleco de biofeedback); LTD–1 por ĝeneralaj laboratoriaj mezuradoj (sango kaj urino). Kompletigaj unuoj: MEDIPRINT indikpresilo (por noti kune kun la instrumentoj de identiga celo proksimume 30 diversajn karakterizilojn, signitajn kaj dimensiitajn); MO 55 Mikrokomputilo (por akcepti la indikojn de MEDIPRINT cele de plua prilaboro) kompletigebla per fonmemoriaj rezerviloj por pligrandigi la kapaciton, kaj krome kun TELETYPE por memorteni la anamnezon (priskribo de antaŭaj malsanoj), aŭ noti la informojn.

MEDICOR MEDICOR

REVUO DE REVUOJ

Pri agado en fakoj: *pretiĝas sporta terminaro* — raportas ESPERANTO (oficiala organo de UEA) 1977/4. Krom la Esperanta difinaro de 3000 terminoj (fakesprimoj) la libro enhavos iliajn anglan, Esperantan, francan, germanan, hispanan, hungaran kaj rusan tradukojn. „Mi povas diri, ke provizore mi tute ne okupiĝis pri la demando, kiu eldonos la terminaron, kiam ĝi estos preta." — skribas la aŭtoro, Tibor *Újlaky-Nagy* ... „Mi esperas kompletigi la laboron fine de 1979. Mi estas optimisto. Por akiri la financan bazon de la eldono de mia unua libro *(La sporta lingvo en Esperanto. — noto de la red.)* mi faris la unuajn paŝojn nur post la pretiĝo (post kvinjara laboro) en 1972. Mi esperas, ke ankaŭ ĉi-okaze troviĝos ebleco eldoni la vortaron, kondiĉe ke ĝi estos verko necesa kaj bezonata. Kaj mi opinias ĝin tia." — La hungarlanda esperantistaro denove funebras, ĉar unu el la aktivuloj, unu el niaj redaktoranoj Tibor *Újlaky-Nagy* forpasis en junio. Lia morto estas ega perdo de nia komuna afero! Tamen: ĉu lia optimismo praviĝas tiel, ke iu(j) daŭrigas lian laboron?

Kunlaboro inter verkistoj per la internacia lingvo — skribas J. U. en *Heroldo de Esperanto* 1976—12—1. Fine de aŭgusto 1976 estadis en Varsovio/Pollando la tiama redaktoro de ***Hungara Vivo*** kaj *Eszperantó Magazin,* la hungara esperantisto-ĵurnalisto kaj verkisto, Mihály *Gergely,* kiel oficiala gasto de Asocio de Polaj Literaturistoj. S-ro M. Gergely renkontiĝis ankaŭ kun du Varsoviaj verkistinoj-esperantistinoj, Maria *Ziólkowska* kaj Krystyna *Kolinska,* ambaŭ membrinoj de APL. Oni zorgis pri Esperanton parolanta tradukanto en ĉiuj interparoloj de M. Gergely. Dum tiu renkontiĝo forsonis pluraj promesoj, inter alia kunvoko kaj partopreno en speciala internacia seminario de verkistoj de socialismaj landoj, dediĉota al la monda lingvo-problemo kaj ĝiaj sekvoj en la kulturaj kaj literaturaj interŝanĝoj, — skribas *Heroldo* —, kaj ĝin pretas organizi Asocio de Hungaraj Verkistoj en Budapeŝto, kiam montriĝos sufiĉa intereso por ĝi; unu el la laborlingvoj estos Esperanto. — Do, ek! Estas nia kara honordevo memorigi vin ĉiujn, ke la propono devenis el tiu Asocio de Hungaraj Verkistoj, kun kies ordeno (PEN-memormedalo) estis honorita d-ro Kolomano *Kalocsay.*

Etan konversacion publikis *Bulgara Esperantisto* 1976/12 kun la d-ro de filologiaj sciencoj, Maomet Izmajlovič *Isaev.* La eminenta lingvisto respondis al kelkaj demandoj de Vasja *Petrova,* redakta komitatano de BE. Interalie la profesoro menciis en tiu intervjuo, ke en Sovetunio estas kelkmiloj da fervoraj esperantistoj, organizitaj en kluboj kaj rondoj, ĉefe en la urboj *Ufa, Barnaul, Leningrad, Harkov,* en la baltaj respublikoj. Kaj kvankam nuntempe ne ekzistas kondiĉoj por restarigo de la Sovetrespublikara E-Unuiĝo, eble en la proksima estonteco la sovetaj esperantistoj unuiĝos en apartan asocion. Oni nun preparas ties fundamenton por la kelkmiloj da fervoraj esperantistoj, diris k-do Maomet I. Isaev, kiu iĝis nun: „profesoro" — heroldas *Der Esperantist* 1977/1. La Moskva doktoro de filologiaj sciencoj, Isaev en novembro 1976 iĝis *nomumita profesoro ĉe la Akademio de Sciencoj de USSR.* Prof. Isaev estas specialisto por la fakoj iranistiko, sociolingvistiko kaj interlingvistiko, kaj kiel tia rekonita en Sovetunio kaj en eksterlando — prezentas lin la publikisto. En la nomo de la legantoj de HV ni varmkore gratulas al la honorigo!

La *Polaj Eer-Linioj LOT,* entrepreno, kiu de longa tempo utiligas Esperanton por informado, preparas nun sian *novan bultenon* ĝuste en Esperanto — ni povas legi en Eŭropa Esperanto-Revuo (Sendependa internacia gazeto, *Nürnberg)* 1976/6. La bulteno — tute senpaga, eldonkvanto en 1000 ekzempleroj — estos titolita „La historio de unu artafiŝo". La kronikisto substrekas, ke ĝi estos jam la kvara bulteno de LOT en Esperanto. LOT aperigis ankaŭ ĉ. 20 000 poŝtkartojn kun Esperantoteksto kaj vortareton, en kiu Esperanto aperas apud kvin aliaj lingvoj (oni distribuis ĝin dum la UK en Beogrado). Ĝin oni povas mendi ĉe: LOT, Varsovio/Pollando, str. *Grójecka 17.*

Samkiel ni legas pri tio, ke dum la lastaj dek jaroj la *Urba Turistkomisiono de Turku* eldonis tri prospektojn, nun aperis la kvara, kiu superas ĉiujn pli fruajn: bunteco de koloroj, abundaj informoj, belaj bildoj. Petu ekzempleron ĉe Turisma Oficejo, *Käsityöläiskatu* 4, SF—20100 *Turku 10.* Ĉu estas vere, ke en Turku, urbo en Finnlando, *ĉiam okazas io?* Tion asertas la titolo de la prospekto.

F-ino Margaret Lola *Ronald* deĵoris dum la *Olimpikoj en Montrealo* kiel oficiala gastigantino — skribas *Lumo,* kvaronjara oficila organo de Kanada Esperanto-Asocio (1976/4). Verŝajne unikaĵo estas en la historio de la Olimpikoj, ke inter la kvin lingvoj ŝi entreprenis interpreti ankaŭ per Esperanto. Malfeliĉe preskaŭ neniu uzis ŝiajn servojn en Esperanto — bedaŭras la informisto —, espereble en *Moskvo en 1980* pli da gastigantoj ofertos Esperanton kaj pli da sportistoj petos la servon! Ankaŭ ni esperegas tion, sed ĉio dependas de la partoprenantoj mem, de la sportistoj!

En sama numero de *Lumo* oni povas legi la mesaĝon de la *prezidanto de Kanada Esperanto-Asocio,* en kiu li demandas kiel oratoro: Ĉu ni sukcesis? Okaze de la novjaro s-ro Merle *Haltrecht-Matte* memorigas nin, ke en 1976, ĉe la Kanada Esperanto Kongreso en Toronto prezentiĝis *rezolucio pri la esperantigo de komunikado en aviado, inter la pilotoj kaj aerodromoj.* Sed por atingi la celon — rigardu antaŭen, ne nur idealisme, sed kun ago, mesaĝas la prezidanto ... „Ne lasu ĉion al la estraro: ni bezonas vin, la individuan membron ... Parolu pri nia celo, skribu al ĵurnaloj ..., donu helpon al izolitaj esperantistoj." Ankaŭ ni opinias, ke tiu agadplano estas aktualaĵo ĉiam, ne nur ĉe la jarfino, kiam oni pensas pri la pasinteco kaj la estonteco.

Mária Rózsa *Szabó*

DEMISILETERO
de Barry N. Malzberg

elangligis Karl Pov

Sinjoroj:

Nu, vi povas imagi kiom min ŝokis kaj teruris vekiĝi en mia propra senpretenda lito en ĉi malluksa sed tolerebla ĉambraro kiun mi nomas mia hejmo, trovante ke apud mi kuŝas iuspeca abomeninda *insekto* tiel granda kiel homo, kun strangaj verdaj skvamoj kaj profundaj borantaj okuloj sur la tuta korposurfaco, okuloj kovritaj per nenio malpli ol etaj nigraj *palpebroj* kiuj tremadis ferme-malferme al mi; vi povas imagi mian kreskantan timon kiam *l'estajo,* kiun mi apenaŭ kapablas prisribi ĉar mi ankoraŭ ne povas plenforgesi tiun unuan emoĉian reagon, alparolis min en tute normala kvankam iom ŝafa kaj ineca voĉo. „Nu, Frederiko," ĝi diris al mi, „jen kio fariĝis el via vivo; jen kion vi faris el via vivo kaj mi timas, ke vi devos min akcepti."

La *racieco* de la estaĵo! Nu, mi tute ne povus surpaperigi ĉi bizarajn memorojn tiel ke vi kredus al mi; ni frontu la veron, sinjoroj, *mi* pretas fronti la veron: ĉi tiu letero kiun vi ricevos morgaŭ vespere ĉe la Buroo laŭ mia plej bona kalkulo ŝajnos al vi *freneza* kaj kiel delirado de *maniulo,* negrave, kiel mi min esprimu, sed kiam vi komprenos, ke ĉio ĉi estas ligita al mia *nerevokebla demisio* disde la Buroo kaj ĉiuj ties aferoj, vi almenaŭ, mi scias, legos plu. Prema kaj hororplena fasciniĝo vin pelos tra ĉi kelkajn paĝojn; ja minimume mi estis kompetentega eĉ se iom tro obsedita komizo, kies mankon vi dolore sentos. Vi volos ekscii la motivojn, kaj laŭ mia pleja kapablo ĉi letero enhavos la motivojn, *ĉu aŭ ne ili plaĉos al vi.* Vi bonvolu enpoŝtigi al mi la lastan ĉekon, inkluzive kolektiĝintajn kompensojn pro postdejora laboro kaj neuzitaj ferioj kaj malsanforestoj al la ĉi-suba adreso, kiu estas la adreso de mia patrino; mi esperas ke ŝi siatempe klopodos venigi ĝin al mi, sed vi nepre ne sendu ĝin al mia propra adreso ĉar *la insekto ne forlasos min,* eĉ ne dum momento, kaj mi ja ne povus aperi en la akceptejo antaŭ la sendistinga vico da poŝtkestoj en tia stato sen katastrofaj konsekvencoj. Ĝis nun mi sukcesas vivadi per telefona mendo kaj livero de manĝo kaj trinko, kovrante la insekton per mia korpo kiam mi malfermas la ĉenitan pordon ĝuste sufiĉe por akcepti la skatolojn kaj pagi kontante, sed mi ne scias. Ĉu tio senfine daŭros, kaj kelkaj liveristoj ja kurioze min algapas. Bonŝance, la najbarajo kie mi loĝas toleras preskaŭ ĉian individuan manion, kondiĉe ke ĝi restu en sia loko kaj cetere mi de longe havas reputacion kiel ioma „strangulo," do eble mi sukcesos dum kelka tempo daŭrigi la aranĝon. Eble ne. La afero ne estas en miaj manoj. La *insekto* tion decidos.

Sed mi parolas pri tiu mateno antaŭ kvar tagoj kiam mi vekiĝis dum ĝi kuŝis plenaplombe apud mi; vin ne zorgigu la evoluantaj cirkonstancoj. „Frederiko," ĝi daŭrigis, „vi travivis ĉagrenan, kruelan, senutilan kaj sencelan vivon kaj tiel venigis min al vi. Kulpas neniu krom vi. Fakte, Frederiko, *mi estas via vivo,*" la insekto diris kaj etendis siajn ĉirojn por masaĝi kaj karesi min.

Ho, la hororo! Tiu klara, tremiga, malvarma tuŝo en la grizaj spacoj de mia lito, dum etaj flikpecoj da sunlumo makulis la plankon sed lasis nin en efektiva tenebro. Mi diras denove ke mi ne povas tion priskribi, nek ekzistas motivo por tion fari; ekzistas, sinjoroj, sensacoj nekomunikeblaj. Mi provis elsalti el la lito sed sentis min ankoraŭ ŝlostenata de la estaĵo, kiu rigardis min per siaj diversaj abscesoj kun morta trankvilo. „Neniam, kompreneble, vi povos foriĝi de mi," ĝi diris. „Mi restos kun vi ĝis la fino de via vivo. Tamen, ni povas tion ĉi fari agrable aŭ malagrable. Mi sugestas, ke vi akceptu la situacion; vi ne havas alternativon."

Finfine mi sukcesis forŝiri min de la lito kaj mi ekstaris ĉe la muro, kvazaŭ tenante ĝin por apogo. La estaĵo kuŝis en la lito; ĝiaj ŝvelaj surfacoj ondadis senorde, kaj ĝi rigardis min sen mieno al mi komprenebla. Mi tiam ekrimarkis la odoron, kiu ŝvebis de la estaĵo; odoron de kunmiksitaj elspiro kaj ŝvito, fetoran, ŝliman, putran, supreniĝantan de la lito cirkloj kaj pleniganta la ĉambron. Mia abomeno fariĝis urĝo kaj mi sentis min frapita kaj vomema, do atingis la necesejon kie, dum tre longa tempo, mi postenis sola super la fekujo. Fine, ekpovante stariĝi, vidante, ke mi estas sola, mi paŝis al la pelvo, rigardis en la spegulon al la ordinara, senhumura, kompatinda vizaĝo de Frederiko *Valker,* vicĉefa reklamacikomizo ĉe subfako de la Buroo, kaj vidante la serenon kaj klaron de tiuj okuloj mi sukcesis min konvinki, ke temis pri sonĝo, deliro, deziro iuspeca: la estaĵo ne ekzistas, mi imagis ĉion-ĉi, kaj revenante al la ekstera ĉambro mi trovos ĝin malplena kaj antisepsa, mi aranĝos min enmanigi al kompetenta kuracisto por helpo.

Mi povis konfesi al mi, ke dum tro longa tempo mi rifuzis konfesi iujn faktojn de mia vivo: la neŭrastenion, la solecon, la malsukcesoŝ ĉe homaj kontaktoj, tiun nebulan malamon al la patrino kiu igis min timi kontakton kun ĉiuj virinoj... kaj mi trovis ĉi konfeson saniga; mi havigos kuracan terapion, mi nudigos la faktojn de mia vivo; ne estas tro malfrue je la kvardek-tria jaro aŭ pli demeti la antikvan Adamon. Tiel pensante mi revenis en la dormoĉambron kie la estaĵo jam transiris al seĝo kie ĝi sidis, kun kruretaĉoj enkurbigitaj unu sur alian, flirtante en la venteto, min rigardante. La odoro estis, se eble, eĉ pli forta kaj penetra. Se mi ne tuj ion entreprenos ĝi plenigos la tutan konstruaĵon ĝis la dek-sesa etaĝo, kaj en kia kaĉo mi troviĝos do kiam oni fine enketos? Mi trovis ŝprucpuriligon kaj trateksis la aeron per ĝi, sencese esperante, ke la estaĵo montriĝos ĝismorte alergia. Ĝi tamen ne moviĝis de la seĝo, daŭre min rigardante kun dolora kaj solena mieno, dum la puriga ŝpruĉaĵo forigis la putron el la aero tiel, ke mia apartamento odoris ne pli forpuŝe ol publika pisejo. Finfine ne plu restis taskoj zorgendaj: mi devis fronti ĝin, mi ja frontis ĝin, de transĉambra distanco. Mia hororo jam iugrade mildiĝis; ekzistas nenio, sinjoroj, kiun la nevenkebla homa spirito ne povus fronti post alkutimiĝo. „Mi pretas," mi diris al la estaĵo, „bonvolu diri al mi kial vi ne povas foriri. Vi *devos* foriri; ĉe tion mi ne povas elteni."

„Mi bedaŭras, Frederiko," diris la insekto, „sed mi ne povas. Dum la cetero de via vivo mi devos resti apud vi; ekzistas ebleco de alia asigno aŭ reveno post via morto, sed tion ni ne konsideru ĉi-momente. Vi devos akcepti min. Vi devos akcepti ĉi tion. Por neniu el ni troviĝas eliro."

„Sed kial?" mi diris, sentante min denove kunfaldiĝi por vomado sed subpremante ĝin per volstreĉo. (Kaj nun kvar tagoin poste, sinjoroj, mi tute ne vomemas kaj iam akcentis la situacion, sed vi devos akcepti mian demision senproteste kaj tuj sendi mian ĉekon al la adreso de mia patrino ĉar *kiu ajn komplikaĵo povus min denove inciti.*) „Kial vi estas ĉi tie? Kio okazis? Kial vi estas kun mi? Ĉi tio estas infero."

„Ne, Frederiko, ne," la estaĵo diris malĝoje kaj moviĝis en la seĝo; la odoro bloviĝis al mi denove kaj unuafoje mi ekkomprenis, ke la estaĵo abomenas same multe kiel mi, ke ĝin plenigas hororo ke ĝi retenas la sinregon nur per dispono de energioj preter mia kompreno. „Ne, Frederiko," ĝi diris, „vi ne estas en infero.

Mi estas en infero."

* * *

Kopirajto (c) 1976 de Roger Elwood. Unue aperis en **Strange Gods.** Represita lau permeso de la autoro.

D-ro FERENC LÁSZLÓ

AKVOEKONOMIO ESTAS KOMUNA AFERO DE LA SOCIO

Preskaŭ ĉiu rilato de la multfaceta kunligo koncernanta la socian bonstaton, la ekonomian vivon kaj la naturan medion dependas de la akvaj cirkonstancoj. ... Tiu ĉi konstato, aŭdita en junio en la hungara parlamento, — ne estas iaspeca novdata sentenco. De praaj tempoj altiris la homon la teritorioj akvoriĉaj, bordoj de riveroj, lagoj, maroj, — kaj tio karakterizas la formiĝon de spontanaj strukturoj de loksidiĝoj. Se ekzemple pretiĝus tia geografia karto, sur kiu markas la linioj de tersuprajaj akvoj, riveroj, lagoj, — la vicoj de la urboj, vilaĝoj klare prezentus la liniojn, limojn de tiuj akvoj. La proksimeco de akvo kaj la deziro por pli bona vivo de mil jaroj altiris unu la alian, kiel polusoj de magneto, — eĉ se ne pro konsciaj ekonomiaj sociaj konsideroj. Plie la lukto por la vivo faris valora la akvon, kiun la slogano de la Medioprotekta Mondtago de UN nomis baza fonto de ĉiu vivo.

La popolaro de Tero uzas jare po 580 miliardojn da m^3, el tiu nemalhavebla nacia trezoro, por funkciigi la industrion, la agrokulturon, por trinkakvo kaj sanitaraj celoj. Kiel sekvo de la socia, ekonomia evoluo, — laŭopinie — je la jarmilŝanĝo en la tuta mondo duobliĝos la akvobezono por unu kapo. La „debito" de la akvo tiel rapide kreskos, ke la „ekonomia enhavo" de tiu naturtrezoro esence ŝanĝiĝos. Hodiaŭ la *pura akvo* jam ne estas sole senpaga donaco de la naturo, sed ĝi estas produktaĵo, produktilo, varo kreita per multe da malfacila laboro, per multo da maŝinoj, instalaĵoj. Tio havas mezureblan, kalkuleblan valoron.

En Hungario dum la kvina Kvinjarplano ni dediĉas entute preskaŭ 40 miliardojn da forintoj — do jare po 8,8 miliardojn — por investadaj, konservadaj kaj konstruaj laboroj de akvoekonomiado. Dum kvin jaroj oni devas fari preskaŭ 140 milionojn m^3 da terlaboro kaj 1,7 milionojn m^3 da betonlaboro por ke konforme al la bezonaĵoj funkciu la lukto por la evoluigo de akvoprovizado kaj tiu kontraŭ la detruoj far la akvoj. La premtubaro longiĝas per 7,6 milionoj da metroj dum kvin jaroj, kaj estos konstruitaj ĝis 1980 ŝtalmekanismoj de 52,3 mil tunoj. Ĉi tiuj estas nur kelkaj ekzemploj por montri la amplekson de la hungara akvomastrumado.

Ne hazarde do, ke la „rango" de la akvoekonomio kreskas kune kun la rapide kreskanta valoro de la akvo. Pro socia kaj ekonomia neceseco estis kreita la *Landa Hidrologia Ĉefdirektoraro* en 1953, submetita al la Ministro-konsilio. Tiel la hidrologiaj laboroj estas disponataj per unueca gvidado, anstataŭ la pli frua direktado far pluraj ministraj fakoj. En 1964 estis kreita la *Hidrologia Leĝo*, en 1965 aprobita la *Landa Hidrologia Plankadro*, kaj en 1968 la parlamento pritaksis la situacion kaj taskojn, krome la difinon de la akvomastrumado. Tiam ĝi fariĝis memstara popolekonomia fako, kiun direktas la *Landa Hidrologia Oficejo*. La Ministro-konsilio en 1973 akceptis la perspektivan planon por la sekvaj 15 jaroj kaj en 1976 la *akvomastrumado iĝis memstara popolekonomia branĉo*. Tio estas rekono ankaŭ de la hodiaŭa laboro de la hungara akvoprizorgado, havanta grandajn tradiciojn.

Tiu organizaĵo havas 12 direktorarojn kaj pr. 70 mil laborulojn. Bona organizado kaj la necesaj materialoj ebligas plenumi ĝiajn taskojn. Tiujn ni resumas jene: kontentigi la akvobezonojn de la loĝantaro kaj de la popolekonomio, malpliigi la inundodanĝerojn, protekti la akvopurecon kaj la naturan medion. Laŭ tiuj labortaskoj pritraktis la parlamento la raporton. En la sekvanta vigla diskuto oni akcentis: certas, ke la ĉefa celo estas konstanta evoluigo de la akvoekonomio-organizado kaj de ĝia teknika bazo, — tamen ankaŭ plue ne estas malhavebla la *socia kunlaboro*, sen kiu ne estas solvebla la efika protektado de la akvopureco kaj la ŝparado de la akvo. „Milionoj de ŝtatanoj, se ili ne toleras, ke en ilia hejmo senutile forfluu la akvo, jam estas aktivaj partoprenantoj de la ŝparema akvomastrumado ... Dankon kaj laŭdon meritas miloj de la sociaj allaborantoj, kiuj organizite aŭ memstare gardas la kvaliton de niaj akvoj ..." — emfazis la prezidanto de OHV (Landa Hidr. Oficejo) en sia raporto en la parlamento.

La helpo de la socio necesas evidentege, tamen samtempe — kaj tio estas la akcentita kaj nova konstato en la parlamentejo — la akvoprizorgado memstare, laŭeble baziĝante sur propraj fortoj devas solvi la malfacilajn taskojn de ŝirmado kontraŭ inundoj, sen multekosta mobilizado de dekmiloj da sociaj helpantoj kaj de centoj da fremdaj maŝinoj. La kontentiga evoluo de nia kontraŭinunda digosistemo kaj ties teknika bazo, krome la fido en la sindona, eksperta, respons laboro de la hidrologia laboristaro estas per la supraj motivoj rekonitaj kaj laŭditaj. Kiel pravigan ekzemplon ni mencias la bonrezultan ŝirmadon kontraŭ la ĉi-jaraj vintraj kaj printempaj inundoj, kio *ne* necesigis plusajn elspezojn de nia popolekonomio.

En la parlamenta sesio la alparolantoj ne hazarde



La artefaritaj lagoj de Abaliget (departemento Baranya)

konstatis kontente la rapidan evoluon de la akvoprovizado al la loĝantaro. Antaŭ la liberiĝo entute nur 20% de la loĝantaro de nia patrio povis ĝui la avantaĝojn de la akvodukta salubra, pura akvoprovizado. Ĝis hodiaŭ tiu proporcio kreskis al 66%, kaj kompreneble simile daŭriĝos. La rapidecon de la kanalizado oni devas pliigi, kaj tio estas kunligata kun protektado de la homa medio kaj de la akvoj kun la taskoj malpliigi la „civilizadajn nocojn". En tiu planperiodo estas responsa tasko haltigo de la polucio de vivaj akvoj, plibonigo de la pureco de akvoj. La pli bonkvalita akvo signifas pli multan akvon, kaj tio estas baza kondiĉo en nia lando, malriĉa je akvoj. Alia problemo estas la ŝparado per akvo, kio signifas ne sole ĝustatempan fermon de la akvokranoj, sed urĝigas ankaŭ enkondukon de modernaj, akvoŝparemaj industriaj produktad-teknologioj kaj de efikaj, laŭtempaj irigaciaj sistemoj. Sed tio ne estas jam tasko de la akvomastrumadaj laboruloj, sed tasko de ĉiu — de la infanoj ĝis la uzingvida inĝeniero, la prezidanto de produkta kooperativo, la direktoro — kiuj ĉiuj konas kaj altetaksas la hodiaŭan, altiĝintan valoron kaj rolon de la akvo en nia vivo. Tial ni kuraĝas esprimi la rezulton de la parlamenta konsultado jene: *akvo-afero: ĉies-afero.*

Bone respegulas tiun penson ankaŭ tiuj farendaĵoj, kiuj prezentiĝis dum la parlamenta sesio rilate la foran futuron de la akvomastrumadaj taskoj. Ni superrigardu kelkajn el tiuj.

Kiel servi la futuron?

Kiel ni menciis, pro la rapidiĝanta socia-ekonomia evoluo oni devas respondi al la altiĝantaj akvobezonoj kaj doni pliiĝantan ŝirmadan sekurecon kontraŭ nocaj efikoj en la akvoj. Ĝuste pro tiu evoluo pliiĝas la pretendoj por ĉiurilataj, ĉefaj kaj akcesoraj instalaĵoj.

Tiu ĉi pretendo en Hungario estas kontentigebla — pro la kontraŭdiro inter la limigita, tempe kaj space

Konstruado de akvorezervujo sur la monto Geilért

Rapide progresas solvado de trinkakvoprovizado en la vilaĝoj

ekstreme varia akvoprovizo kaj la kreskantaj postulaĵoj — nur per daŭre pligrandiĝantaj kostoj, pli granda organiziteco, pli alta teknika, kompleksa interveno.

La industria produktado de 1975 ĝis 1990 antaŭvideble triobliĝos kaj la pli dinamika evoluo estas atendebla ĝuste sur tereno de la plej akvopretendemaj industribranĉoj, nome sur tiuj de la kemia-, elektra-, nutraĵ-industrioj.

La agrokultura produktado evoluos pli rapide, ŝanĝiĝos ankaŭ ĝia produkta teknologio, ĝeneraliĝos ĝia industrieca produktado. Gravaj ŝanĝoj sekvos en la konsisto de la vilaĝa loĝantaro kaj ties pretendo por servoj estos sama kun tiu de la urbanaro.

Malgraŭ la malpliiĝo de la kulturitaj agroterenoj realiĝas la produktado de pli grandkvantaj kaj pli bonkvalitaj agrokulturaĵoj. Ĉi tiu cirkonstanco elvokas gravajn ŝangojn en la agrokultura akvoutiligo. Specialan atenton meritas la konsekvencoj de la plimultiĝo de la bestbredado. La industrieca bestbredado kaŭzas signifan ŝanĝon en la agrokultura akvouzo kaj kvantan pligrandiĝon.

En lokaj kaj tempaj etapoj kelkfoje jam nun sperteb a akvomanko admonas, ke la naturdevenaj someraj akvoprovizoj ĉiam pli kaj pli malebligas la kontentigon de akvobezonoj. La geografia situo de nia lando, kaj tiu fakto, ke la akvoj de la riveroj — fluantaj el la najbaraj landoj sur nian teritorion — parte jam estas foruzitaj eksterlande, parte jam tie estas poluitaj, atentigas, ke la mastrumado per la akvorezervoj iĝas plej grava tasko de la hidrologio.

Proporcie kun la pliiĝanta akvoutiligo kaj sisteme oni devas zorgi pri la disdono de la akvokvantoj, pri transkonduko al akvomankaj teritorioj, kaj pri dumtempaj transgrupigoj. En diversaj regionoj de la lando estas diferenco (oni nomas tion: „streĉo") inter la bezonataj kaj ekzistantaj akvokvantoj. La akvomanko estas speciale granda en la valo de Tiso, sed similas la situacio ankaŭ en kelkaj industrie evoluintaj distriktoj, kie la pretendoj estas kontentigeblaj nur per rezervujoj aŭ tien kondukitaj akvoj.

La akvoekonomio servas la racian mastrumadon per konstruado de modernaj disdividaj sistemoj havantaj ma multan akvoperdon, kaj per certigo de — laŭ la celoj — diferencigita kvalito de la akvo. Por pliigo de la utiligeblaj akvoprovizoj, la translokigo de superfluaj, eĉ nocaj akvoj, rezervigo de akvo por periodoj de akvominimumoj necesigas konstruon de malgrandaj kaj mezgrandaj rezervujoj. En Hungario estas ebleco unuavice por la lastnomitaj rezervujoj. La ĝis nun konstruitaj rezervujoj havas la volumenon de sume 600 milionoj m^3. Tiun volumenon oni devos kreskigi plurobla ĝis la jaro 1990. Krom la konstruado de tersurfacaj rezervujoj oni devas malkaŝi la eblecojn de subteraj rezervujoj.

Necesas apliki teknologiojn de akvoŝparaj kaj akvopurecon gardaj procedoj. Ni rigardas la fabrikan akvomastrumadon, (kaj en ĝi) la akvopurigadon kaj ĉirkaŭkondukadon de akvo — parto de la fabrika teknologio. En la planado de koloniizado kaj region-evoluigoj validiĝis jam la kompleksa realigo de diversaj sociaj kaj ekonomiaj aspektoj. Komuna intereso es-

Akvoturo en la loĝkvartalo de Ujszeged

Instalaĵo por purigi poluitajn akvojn en Siófok

tas, ke oni konsekvence kaj ĉie validigu ankaŭ la hidrologiajn interesojn. Tiel ni povas reguligi racie kaj sen neatenditaj surprizoj la tutlandan kaj regionan bilancon kaj el la vidpunkto de la rezervitaĵoj kaj de la pretendoj.

La interkroĉon de la du grandaj Hungarlandaj hidrogeografiaj unuoj: la Danubo- kaj Tiso-valoj, solvos la Danub-Tiso-kanalo realiĝonta ankoraŭ antaŭ la jarmil-transiro. La pli ol cent km-ojn longa kanalo ebligos la alporton de akvo en la Tiso -valon por kompletigi la nesufiĉan akvokvanton, kaj servonta la orient-okcident-direktan akvotrafikadon. La kanalo krome havos gravan rolon en la plua evoluado de la Danub-Tiso-interriverejo, ĉefe ankaŭ por provizadi per akvo la tiean loĝantaron, la industrion kaj agrokulturon.

La supre skizitaj kondiĉoj kaj eblecoj atentigas pri la fundamenta signifo de Danubo en la akvomastrumado de Hungario.

Kunlige kun la plilongiĝinta libertempo multobligas la taskoj konstrui novajn somerumejojn, refreŝigejojn. Tio signifas, ke la akvoduktan reton kaj kanalizadon oni devas efektivigi por granda parto de la loĝantaro duoble (por la hejmo kaj por la somerumado).

La valoro de la popolekonomiaj posedaĵoj sur la terenoj danĝerigitaj de akvoj superas la 450 miliardojn da forintoj, kaj tio rapide kreskos. Tiu ĉi cirkonstanco postulas kreon de teknike konforma ŝirmado kaj ties kvalitan evoluigon, efikecon.

La akceleriĝanta evoluo sekvigas polucion de nia medio, de la grundo, akvo kaj aero. La protektado de akvokvalito estas baza kondiĉo de ĉiuj akvomastrumadaj taskoj, kies realigo estas unu el la plej gravaj faktoroj de medioprotektado.

La modernaj aspektoj de la levo de akvokvalito superkreskas la poluakvo-purigadon, ni kalkulas pri certigo de dilua akvo kaj pri aliaj modernaj solvoj.

La protektado de akvokvalito iĝas problemo ankaŭ de la socio kaj tio necesigas intensivan pluan evoluigon de la kapacitoj kaj teknikaj preventoj, kune kun efektivigo de dispozicioj kompleksaj, direktiĝantaj protekti la akvojn kaj aliajn mediojn.

Tr. A. *Pechan*

Skafandristoj kontrolante digojn dum la printempa inundo 1977

GUSTO KAJ MODO

Laŭ la proverbo „pri gustoj oni diskuti ne povas". Tiu ĉi proverbo ne diras la veron — pri la gustoj oni povas kaj eĉ devas diskuti.

La elirpunkto de la proverbo estas, ke ĉiuspeca gusto, la gusto de ĉiu homo estas senescepte egalrajta. Tamen ni parolas pri *bona* kaj *malbona* gusto, kaj ĉi tio jam kontraŭdiras la proverbon.

La gusto havas ne nur individuan, sed ankaŭ socian radikon. Ĉar *gusto estas konkreta formo de estetika sento de homoj vivantaj en la samaj sociaj cirkonstancoj.*

El ĉi tio sekvas, ke la gusto estas socia fenomeno. Pro tio ni povas paroli pri la gusto ĝenerale kaj taksi la guston de la opaj homoj. Kompreneble la gusto dependas ne senreste de la sociaj cirkonstancoj, sed estas samtempe individua, subjektiva afero. En certaj epokoj la gusto de homoj, kiuj vivas en la sama tempo kaj geografiaj cirkonstancoj, havas ĝeneralan karakteron: sed en aliaj epokoj samtempe multeco de gustoj regas. Ĉi tio dependas de la solideco de socia ordo en la donita historia epoko. Ekzemple, en la mezepoko en la Eŭropa kulturrondo la strikta diferenco inter la gusto de la altaj kaj malaltaj sociaj klasoj montras la fakton, ke la klasrilatoj tiam estis certaj kaj netuŝeblaj. Kompreneble ni scias pri movadoj kontraŭ la mezepoka socia ordo en la formo de lukto de religiaj sektoj, tamen la ĝenerala aspekto de kelkaj partoj de l'mezepoko ŝajnas esti neŝanĝema. Kiam la socia situacio rapide aliiĝas, la gusto de la malfortiĝanta klaso fariĝas dekadenca. Konvinkan ekzemplom ni povas vidi en la dekadenco de la burĝaj klasoj en la 19-a jarcento.

Interese estas, ke en la pli altaj sociaj klasoj multspecaj gustoj luktas unu kontraŭ la alia, sed en la rondo de la homoj, vivantaj proksime al la tero kaj estantaj en konstanta rilato kun la libera naturo — do ĉe la kamparanoj — problemoj de la gusto ne ekzistas. En certa epoko kaj sur certa teritorio la stilo ekz. de la

kamparanaj kantoj estas plejparte unueca.

Ofte oni povas aŭdi la eldiron, ke „bela estas tio, kio plaĉas sen intereso". Ĉi tiu eldiro estas ankaŭ flanko de la problemaro de gusto. Sed ĝi ne estas ĝusta. Ĝi ekestis en la 18-a jarcento kaj reprezentas la principon de la izolemo de la intereso dum tempo, kiam la komenciĝanta kapitalismo detruis ĉiun alian vidpunkton krom la intereso. La eldiro estas esprimo de la deziro izoli sin disde la socia. ĉirkaŭaĵo. Ĝi izolas ankaŭ la estetikon disde la etiko, la belon disde la bono, kaj pro tio precipe en nia tempo ne estas akceptebla flanke de konsekvenca adepto de la humanismo.

En strikta kontakto kun ĉi tiuj pensoj estas la problemaro de la *modo.* Kompreneble, en la klasa socio la modo havas klaskarakteron. Ni ja scias, ke ekzistas metodoj, per kiuj la fabrikistoj kaj komercistoj povas influi la ĝeneralan guston por certigi bonan eblon vendi siajn varojn. Ĉi tio estas la tasko de la modokreantoj, se temas pri la moda vestaĵo. Sed ĉi tiu agado povas havi nur efemeran rezulton, kio ja estas same favora al la entrepenistoj, ĉar tiamaniere ili povas trovi merkaton por la plej multspecaj aĵoj.

Ni ne devas pensi, ke la nocio „modo" rilatas sole al la vestado. Moda povas esti ĉiu aperaĵo de la socio, ĉio, kio dependas de la individua gusto. Tiuj homoj, kiuj strikte sekvas la alternadon de la modo, plejparte reprezentas grandan kontraŭdiron: ili obeas al la tendencoj de la modo, do ilia gusto ne estas vere sendependa, kaj samtempe ili deziras ŝajni memstaraj individuoj; ili do volas decidi sen risko.

Estas necese diri kelkajn vortojn pri la danĝero de la pseŭdoarta filistra tipo de la „kreaĵoj", kiujn oni amase fabrikas kaj konsumas. Ili servas la bezonon de la senfantaziaj homoj. El tio sekvas, ke ĝin kontraŭdiras ĉio, kio malproksimiĝas de la ŝablono, de la griza ĉiutago. Ĉi tiu speco de „verkoj" ne toleras ion ajn eksterordinaran, nekutiman.

El la ĝis nun diritaj pensoj ni povas konstati, ke la gusto estas direktebla en pozitiva kaj negativa direktoj. La homo estas edukebla al la bona gusto. La kulto de la filistraj pseŭdo-artaj verkoj malhelpas ĉi tiun edukan agadon.

Sen gusta kulturo ne estas eble ekkoni la belecon kaj sencon de la vivo. La kulto de la senvaloraj artaĵoj faras la vivon dezerta kaj nuda, la tagojn, monatojn kaj jarojn monotonaj kaj enuaj. Ĉi tiuj „artaĵoj" edukas la popolon al neagemo, dekutimigas ĝin de la memstara pensado kaj sentado. Kontraŭe, la altnivela gusta kulturo instruas ekrimarki ĉiun belon, kiu ĉirkaŭas nin.

La kreo de altnivela kulturo de gusto estas antaŭ ĉio la tasko de la *arto.* La devo de la hodiaŭa progresa arto estas detrui la negativajn gustojn, la grizajn ĉiutagajn pensojn kaj sentojn, kaj helpi la konstruon de humanisma mondo. Ĝi kontraŭas la klopodon kontentigi sole la momentajn bezonojn.

Lajos *Lesznai*

TIBOR ÚJLAKY-NAGY

Kiel ni jam raportis, la 6-an de junio 1977 mortis Tibor *Újlaky-Nagy*, unu el la plej elstaraj hungaraj esperantistoj, ekde la komenco plej diligenta kunlaboranto de nia redakcio. Li estis nur 62-jara, vigla, energia homo, kiu kun juneca freŝo ĵetis sin al ĉiam pli kaj pli malfacilaj taskoj, kaj plenumis ilin ĉiam zorge, akurate, eĉ arte. Esperantistoj ĉie en la mondo ekkonis novelojn de elstaraj hungaraj verkistoj surbaze de liaj tradukoj. Ili ekkonis la vivon kaj arton de la hungara popolo el liaj originalaj artikoloj. Li estis ŝatata kaj honorata laboristo kaj poste administranto ĉe la Esplora Centro por Akvomastrumado, sed li estis multe pli konata eksterlande kiel inspirita diskoniganto de la hungara kulturo.

Ekde 1970 li okupiĝis pri scienca laboro. Kompreninte la gravecon de facila rekta komunikilo inter la diverslandaj sportistoj, li dediĉis sin al la evoluigo de la sporta lingvo. Lia pli ol 300-paĝa libro *La Sporta Lingvo en Esperanto* vekis interesiĝon kaj rekonon ĉie en la mondo. Li multe kontribuis ankaŭ al la *Slipara Vortaro* de R. *Eichholz*, sed fine ekkaptis lin la granda ideo: krei ampleksan difinvortaron de la sporta lingvo kun esperantlingvaj difinoj kaj ekvivalentoj de ĉiuj terminoj en ses aliaj lingvoj. Meze de ĉi tiu laboro, kiun li volis almenaŭ parte fini antaŭ la Olimpikoj en Moskvo, li estis forkaptita de la morto.

Tibor Újlaky-Nagy estis plenvalora homo. Li plenumis siajn oficajn devojn eminente ĉe sia laborloko. Entuziasme kaj fidinde li plenumis la memvole akceptitajn taskojn por la Hungara Esperanto-Asocio, ties gazetaro kaj eksterlandaj organizaĵoj. Li amis, parte eĉ kultivis la artojn, amis la naturon: sian landon kaj ankaŭ fremdajn popolojn kaj landojn. Tre bone li fartis inter gejunuloj, kaj tiuj amis lin same. Liaj originalaj kaj spritaj programeroj kaj interligaj paroloj konserviĝis en ĉies memoro, kiu partoprenis kulturajn aranĝaĵojn, en kiuj Tibor Újlaky-Nagy rolis.

Lia forpaso estas granda perdo por la hungara kaj tutmonda esperantistaro. Li ripozu en paco.

La Komisiono pri Sciencaj kaj Fakaj Aplikadoj ĉe HEA konsideras sia devo daŭrigi la laboron, kiun Tibor Újlaky-Nagy komencis, kaj ĉirilate ĝi ricevis plenan apogon flanke de la vidvino.

Ottó Haszpra

Magda Szabó

Jiří Kořínek

Al la verkistino Magda Szabó

Kun aprezega admirad' ni staras
antaŭ ravanta verk' de poetin'
kaj riverencon plej profundan faras,
por antaŭ talentego klini nin.

Ho majstra verkistino, volu scii,
ke ankaŭ nin varmigas via lum',
ĉe vi satiĝi kaj de bel' ebrii
ĉiam denove vokas via plum'.

Tiom da sento, da animkompreno,
psikologia kono pri knabin',
rakont' sugesta kaj konvinkopleno,
de kre' artisma super la rutin'!

Patro, patrin', filinoj kaj geavoj
kunestas ĉe l' Statuo de Suspir',
kaptitaj estas de absorbaj ravoj,
de emocio reteniĝas spir'.

Ni dankas vin, se eblus danki vin sufiĉe,
ke ni vin amas, mi aldonas tuj,
ni, kiujn pridonacas tiel riĉe
en tuta mond' filin' de Hungaruj'.

Miyamoto rememoras

Miyamoto Masao: Naskitaj sur la ruino Okinavo. Originala romano.
Eld.: Librejo Pirato (Japanio), 1976, 18 cm, 147 p.
Prezo: 950 japanaj enoj.

NASKITAJ SUR LA RUINO OKINAVO

MIYAMOTO MASAO

Per la libro *Pri arto kaj morto* — kiu intertempe aperis ankaŭ en portugala traduko — *Miyamoto* okupis lokon en la unua vico de la Esperantaj prozistoj jam antaŭ dek jaroj. Por tiu rakont-volumo li ĉerpis temon el la japana mezepoko; en tiu ĉi romano li surpaperigis siajn travivaĵojn kiel militkaptito sur la insulo Okinavo, en la jaro 1945.

Kvankam en la postparolo la aŭtoro atentigas, ke la verko enhavas ankaŭ fikciaĵojn, la tuto tamen impresas kiel memorskribo. La ĉefpersono de la historio estas *Hamada:* evidente tiu nomo kaŝas la aŭtoron, malgraŭ tio, ke Miyamoto parolas pri li en tria persono, kio fakte ofte tre ĝenas. La unua ĉapitro de la verko aperis antaŭ dek kvar jaroj en la revuo *Monda Kulturo* — en „mi"-formo —, kaj mi devas diri, ke tiel ĝi impresis pli aŭtentike, nature. Kial? Nu, simple tial, ĉar Miyamoto ne povas kaŝi sian subjektivecon — ja kompreneble, ĉar *li* travivis teruraĵojn — kaj la truda objektiveco de la „li"-formo malharmonias kun ĝi.

La libro estas tre interesa por eŭropanoj, kiuj efektive malmulte scias pri la eventoj kaj posteventoj de la milito en Azio. Kaj Miyamoto prezentas ĉion tre honeste kaj kun politika akrevido: li ne ŝparas kritikojn kontraŭ la „Tennoismo", kiu kondukis Japanion en la faŝisman militon sed avertas ankaŭ pri la danĝero, kiu kuŝas en la ĉeesto de la usonanoj post la milito.

La rememoroj de Miyamoto certe apartenas al la plej interesaj produktoj de la Esperanta prozo dum la lastaj jaroj, tamen artisme tiu ĉi verko — plie politikaĵo ol beletraĵo — ne atingas la nivelon de *Pri arto kaj morto.* Sed la interesa temo certe kompensos ĉiun pro la mankoj de la artisma ellaboriteco.

Reeldono de klasikaĵo

V. Korolenko: La Senlingvulo. Romano. El la rusa lingvo tradukis: Maria *Ŝidlovskaja estas klasika donis: Dansk Esperanto-Forlag. 19 cm, 191 p. Prezo: 25,— danaj kronoj.*

Maria *Ŝidlovskaja estas klasika* figuro de la Esperanta proza tradukarto: el ŝia plumo aperis tre multaj bonstilaj verkoj, precipe antaŭ la unua mondmilito. Kaj ŝi havis ofte trafajn elektojn — unu el tiuj estas la jena verko de *Korolenko,* kiu priskribas la tragikajn kaj tragikomediajn suferojn, kiujn eltenis simplaj rusaj kamparanoj, forlasintaj sian landon. Vivi „sen lingvo" estas malfacilege — jen temo kiu prave kalkulas pri interesiĝo inter esperantistoj.

La unua eldono de tiu ĉi verko aperis en Esperanto en la jaro 1922, do antaŭ pli ol kvindek jaroj, sekve ne estas mirinde, ke oni devis iomete poluri la stilon de la traduko. La korektoj, faritaj de la Literatura Komitato de F. L. E., plejparte estas pravaj; kelkloke oni tamen superflue ŝanĝis iom arkaiĝintajn, tamen ĝustajn, trafajn kaj kompreneblajn vortojn je pli modernaj.

Tiu ĉi klasikaĵo de la rusa literaturo, kaj samtempe ŝatinda produkto de nia frutempa tradukarto certe trovos plaĉon ĉe ĉiu tavolo de la esperantista legantaro, inkluzive la komencantojn, ja la frutempa Esperanto de Ŝidlovskaja estas vere simpla, klara kaj tamen trafa.

RECENZOJ

DANĜERA GASTRONOMIO

Johán Valano: Ĉu vi kuiras ĉine? Originala romano. Eld.: Dansk Esperanto-Forlag, 1976. 19 cm, 134 p. Prezo: 30,— danaj kronoj.

La verkado de poramuza prozo dum la lasta tempo iom intensiĝis en Esperanto. Kaj se tiu fenomeno ne vekas nure pozitivajn sentojn en la ŝatantoj de la originala literaturo, tamen kun ĝojo oni povas fari almenaŭ du agrablajn konstatojn. La unua konstato estas ke la lingvastila nivelo de tiuj verkoj grave superas tiun de la nacilingvaj similaĵoj, kaj due, oni povas konstati daŭran altiĝon de la profesia nivelo de la Esperantaj poramuzaj verkoj: pasis la tempo, kiam leganto de Esperanta detektivromano jam ĉe la kvina paĝo divenis, kiu estas la murdisto.

La detektivromano de J. Valano estas profesia produkto, ĝi tamen ne sekvas la klasikan nure-logikan modelon de A. *Christie:* la tuto montras la aŭtoron plie disciplo de G. *Simenon.* La morton — kompreneble murdon — de la juna farbisto Paŭlo *Jorli* la aŭtoro ne konsideras nur solvenda enigmo, sed ankaŭ okazo por lanĉi demandojn sociajn kaj politikajn. Dum la tre simpatia detektivo Jano *Karal* — kiu espereble reaperos en postaj verkoj de

RECENZOJ

Valano — esploras la cirkonstancojn, la leganto ekscias multon pri la diversaj politikaj movadoj interne de la junularo de la okcidentaj landoj.

Kompreneble, la politikumado kaj psikologio tute ne malpliigas la strecitecon de la historio: mi certas, ke tre malmultaj legantoj povos ĝin ne finlegi je unu sido. Tre sprita estas ankaŭ la lingvistika ludo, per kiu la aŭtoro kreas „dialekton": tiajo ĉiam estas alloga por esperantistoj, kiuj havas pli ol mezan perceptemon por lingva ĵonglado. Kaj ĉi tie mi menciu, ke aparte laŭdinda estas la konciza, trafa, vere moderna lingvaĵo de la verko: Valano videble bonege regas Esperanton, kaj la lingvomaterialo ĉiam obeeme cedas al lia lerta mano.

Aĉetontoj de tiu ĉi libro — kiun espereble baldaŭ sekvos similaj el la plumo de la mistere nekonata aŭtoro — gajnos tre agrablajn leghorojn.

Utila vojmontrilo

Heide Apolloner: Nia originala prozo. Eseo. Eldonis: Dansk Esperanto-Forlag, 1976. 19 cm, 58 p. Prezo: 10,— danaj kronoj.

La libro de H. *Apolloner* — kiel indikas la titolo mem — estas frukto de la bonvena ekinteresiĝo pri la diversaj aspektoj de la Esperanta kulturo. Precipe utila estas tiu ĉi libreto, ĉar ĝi tuŝas la originalan Esperantan prozon, kiun neglektis dum longa tempo ankaŭ la studantoj de la Esperanta literaturo, kvankam estas evidente, ke eĉ mezkvalita prozo havas pli vastan legantaron, ol elstara poezio.

H. Apolloner faras superrigardon pli la originala prozo ekde la komenco ĝis la nunaj tagoj. Ŝia verko ne havas literatursciencan ambicion, ne pledas por ia sintezo, ne analizas la evoluprocezon de nia proza literaturo. *Nia originala prozo* estas kvazaŭ taglibro de inteligenta kaj sistema leganto de esperantaj prozaĵoj, kaj ĝia ĉefa virto estas la informriĉeco. Per tiu ĉi libreto legemaj esperantistoj povas havigi al si fidindan vojmontrilon tra la kelkcent volumoj de la Esperanta prozo, kaj ĉerpi el ĝi inspiron por la elekto de la legotaj verkoj.

La simpla, facilflua stilo de la aŭtorino faras ankaŭ tiun ĉi vojmontrilon mem tre agrabla legaĵo, kaj mi esperas, ke la konsterne malgranda eldonkvanto — nuraj kvincent ekzempleroj! — baldaŭ montriĝos nesufiĉa.

Vilmos *Benczik*

NI DEVAS VIVI, de Kjell *Walraamoen* kaj Lina *Gabrielli*. Eld. Stafeto. 154 p. 19x12 cm, broŝ.

Komuna poemlibro de konataj gepoetoj — diverslandaj laŭorigine, pere de Esperanto implikiĝintaj en amo profunda, vivantaj portempe en raviga norvega arbara pejzaĝo. Ilia amo interplektas ambaŭ poemseriojn: tiun de la firmeca, robusta norvega arbhakisto, ĉizanta nuancfajnajn versojn pri sia mondo nordeca, kies segmenton plenigas la trovita, aminda virino; kaj tiun de la itala verkistino, ĵetanta sin profunde en la spiritan kaj korpan ĝojon de la mira manifestiĝanta amo. Ĉio ĉi montriĝas por ili same natura kaj plenumenda, kiel la vivo mem en la sino de la norvega naturo:

Eburajn manojn vi havas —
La neĝbrilaj steloj
de l' blankaj montoj
degelis sur viaj haroj
kiel milda rospluvo de l' nokto —

ĉio ĉi prezentiĝas al la leganto sincer-ekshibicie, kvazaŭ kun alvokaj gestoj igi lin aŭskultanto de iliaj intimaj sentoesprimoj, rigardanto de iliaj karesoj:

„Cia buŝo ĉe mia estas
milda venteto kiu floron
karesas."

Arte formitaj impresaj bildoj, subtilaj metaforoj incititaj de la ravaj nordaj naturscenoj svarmas kiel neĝkristaloj en poemoj de Walraamoen *(Noktotrajno preter Rŏros, Neĝvespero)*. tuŝanta foje ian poezian panteismon, tamen lige kun la firmeco de la kreipova viro-laboristo.

Mi volonte konfesas, ke apenaŭ mi legis de poetino iam pli senperajn sent-prezentojn, profunde fosantajn. Tutân amromanon realisman ni kuniras de faz' al fazo. La kordoj de la „in-strumento" ŝajne facile eligas siajn tonojn-vortojn, jen vivgaje sonoras, jen dolor-melankolie ĝemas... ofte ja per tre delikataj, tamen simple-trafaj liberaj versformoj.

E. *Fenyvesi*

LENIN

Ni citas el poemo de granda soveta poeto. Bonvolu la citaĵon ensendi kune kun la nomo de poeto ĝis la 30-a de decembro. Inter la solvintoj ni lotumos premiojn.

HORIZONTALE: 1. Kaj aliaj (mll). *3. La unua parto de citaĵo.* 13. Posteularo. 14. Kemia simbolo de uranio kaj aktinio. 15. Muzika teatraĵo. 16. Virina nomo. 17. Estimi (R). 19. Havos inklinon al io. 20. Poseda pronomo. 21. Verba modo, uzata por esprimi deziron. 23. Femala. 24. Lingvaj Respondoj (mll). 25. Komuniki (R). 26. Rondforme prilabori metalpecon sur turniĝanta aparato. 28. Unuo de elektra rezistanco (R). 29. Boato el arbotrunko (R). 31. Senvesteco (R). 33. Gelateno. 35. Konfuzaj sonoj (R). 37. Rajdilumita. 39. Entomologia Rondo-Esperanto (mll). 41. Komune: arkitekturo, muziko, poezio ktp. (R). 43. Aŭ horloĝo, aŭ mano de patrino (R). *44. La nomo de la poeto (Vladimir Vladimiroviĉ, 1893—1930). Li estis la kreinto de revolucia soveta poezio.* 45. Multego. 46. Fama klubo de Baghy (Esperanto Rondo Amika). 47. Universala Esperanto Asocio. 48. Rita tablo en preĝejo (R). 50. Malnova mezunuo de pezo. 52. Tiu laboro, kiun plenumas forto 1 din sur 1 cm-a vojo. 53. Rilata al kuŝigo, faligo. 54. Eksplodaĵenhava kuglego elpafita per kanono. 56. Ĉiela nutraĵo. 57. Jarcento (mll). 59. Sufikso esprimanta similecon al iu. 60. Legumenaco kulturata kiel furaĝo (R). 61. Ne nur, sed plie; sed krom tio. 62. Morala leĝo (R). 64. Femalbirdo ĉirkaŭ la loĝdomoj (R). 66. Fari ion el nenio (R). 67. Virina kaj arbednomo. 69. Monaĥejestro (R). 70. Impeto (R). 71. L'ludantar. 73. Hidrargo kaj Deŭterio. 74. Esti monavida.

VERTIKALE: 1. La dua parto de citaĵo. 2. Esti ravita pro iu belo (R). 3. Kripla estas la piedo. 4. Difinita epoko (R). 5. Mondkonata japana ludo. 6. Geedziĝo (R). 7. Mezurunuo de perloj (=205 mg-oj) (R). 8. Senkolora likvaĵo, produktita per destilo de ligno. 9. Rivero en Italio. 70. Urbo en la Latva SSR. 11. Movi ŝipon sur akvo. 12. Seĝo de reĝo. 17. Opinii ion bona (R). 18. Maldensa nubaro, aspektanta kiel plumaro (R). 22. Rusa esperantista poeto, tradukisto (Vasilij Nikolajeviĉ), 1862—1938. En la unuaj du kvadratoj komencliteroj de voknomo. 25. Supernoma estaĵo. 27. ...-iome. 29. Stelaro sur la norda stelfirmamento, apud la Taŭro. 30. Cizelo, ĉizo. 32. Postsigno de vundo. 34. Deflankiĝo de la ĝusta vojo. 36. Granda raba pladmarŝanta mamulo (R). 38. Kruela despoto (R). 40. Loka Kongresa Komitato. 42. Reen: oficiala skribaĵo (R). 49. Iama brita reĝo, lian historion prilaboris *Shakespeare. 51.* Konformiĝi je ordono (R). 52. Sukcese eviti ion per forkuro (R). 53. Moke kritika poemo (R). 55. Uranio, Sulfuro, Fosforo. 56. Rabeti terpomojn kaj kortbirdojn. 58. Nedubanta. 60. ... Creek, Sudaŭstralia urbo. 61. Verba formo de v34. 63. La plej grandnombra popolo de Vjetnamio. 65. Stroncio, Holmio. 66. Pura (R). 68. Amata (R). 70. Edzino de Adamo. 72. Persona pronomo. 74. ..., -it, -ot.

—SEMO—



La ĝusta solvo de enigmo en HV 77/3. estas: „pazigrafioj, cifera, ideografioj, pazilalio, apriora, aposteriora, internacia."

Libropremion gajnis: Wolfgang Loose el FRG. V. P. Beŝkarev el Soveta Unio kaj Melánia el Hungario. Gratulon al ili.

NOVA LIBRO EL LA ESTONA SSR

Nur antaŭ kelka tempo ni havis la eblecon recenzi libron eldonitan de la Eldonejo Eesti Raamat, kiu funkcias en ĉefurbo de la Estona Soveta Socialisma Respubliko, en Tallinn. Ĝi estis verko valorega: fragmentoj de la estona nacia epopeo Kalevipoeg, en brila traduko de Hilda Dresen. Kaj jam alvenis nova libro, ĉifoje prozaĵo: la 155-paĝa romano La mastro de Kôrboja de la estona klasikulo A. H. Tammsaare.

La agado de la romano disvolviĝas en la estona kamparo, iam komence de la dudeka jarcento, kaj tra la emocia amhistorio de Anna kaj Villu ni ekscias multon pri la homoj, kiuj vivis tie. Tammsaare estas granda verkisto, kaj samtempe tipa nordano, kiu preferas la sordinitan tonon al la pli fortaj koloroj, sed tra la vualo de ŝajna grizeco kaj senpasieco la leganto vidas veran tragedion. Ĝuinda apartaĵo de la romano estas ĝia perfekta atmosfero--kreo: oni kvazaŭ mem sentas sin inter la kamparanoj de la tiutempa Estonio.

Tiu ĉi Esperanta eldono de la verko povas jam kalkuliĝi kiel antaŭ-omaĝo okaze de la baldaŭa 100-a datreveno de naskiĝo de Tammsaare (30-a de januaro 1878). Espereble multaj esperantistaj kluboj de la mondo primemoros tiun jubileon, kaj eventuale aranĝos Tammsaare-vesperon, utiligante lian romanon.

Estas aparte menciinda la granda optimismo, kiun la laŭdinda eldonejo havas pri la esperantista legpubliko: la libro aperis en 10 000 ekzempleroj! Ni esperu, ke tiu eldonkvanto ne montriĝos tro granda, kaj baldaŭ ni povos saluti aperon de plia estona verko en Esperanto.

Laste laŭ vico, sed laŭ merito tute „mallaste", ni gratulu la tradukintinon Benita Kärt pro la bonstila Esperanta teksto. kaj la redaktoron Henrik Seppik, kiu konjekteble estas la „patro" de la Esperanta eldona aktivado en Estonio.

V. B.

ŜAKO

"Gens una sumus" – Unu gento ni estas

Rubrikestro: d-ro Jozefo Németh
8-a numero:
LŐRINC BATA
1-a laŭdo *„Magyar Sakkvilág"* 1941.

Mato en 2 movoj (komencas B1)

B1.: Rh2, Da5, Te2, Tg3, Ĉa3, Kd5, Ke1, g2 (8)
Ng.: Rd4, Dg7, Td8, Te8, Ĉf7, Ĉh3, b3, b4, g5 (9)

Limdato de la solvo: *30-a de novembro.* Sendota al Redakcio (sur la koverto: „ŜAKO"). Ĉiujare ni donas premiojn en 3 okazoj (po 2 pecojn).

La solvo de la 7-a problemo: ŝlosilmovo estas *1. Da3!*

Nia juna ŝakrubriko dum mallonga tempo koniĝis en la tendaro de la ŝakludantoj. Ni klopodis komuniki altnivelan kaj interesan materion. Samtempe naskiĝis novaj amikecoj inter la ŝakludantoj per nia helpo.
Pro la senditaj rimarkoj, proponoj kaj helpo dankon al: J. Berndt (GDR), H. Bohumil (CS), J. Bajtay (H), Gy. Bakcsi (H), P. Bartalos (H), L. Bata (H), A. Bengtsson (S), Z. Czibulka (H), L. Fiala (CS), V. Filipov (SU), F. Fleck (H), J. Fodor (H), I. Füzesi (H), M. Gáspár (H), I. Győry (H), L. Hüse (H), B. Janusz (PL), L. Kiss (H), A. Keresztes (H), E. Kozyra (PL), H. Kirmse (GDR), W. Loose (GFR), V. Linta (SU), P. Makonski (PL), Z. Mészáros (H), Z. Németh (H), W. Nastaj (PL), W. Petruske (GDR), J. Ruppáner (H), L. Riczu (H), J. Szöghy (H), A. Surmets (SU), V. Šiškin (SU), A. Szegi (H), G. Šuhno (PL), M. Serfőző (H), O. Stolberg (GDR), J. Tomišek (CS), J. Vagenknihl (CS), I. Vén (H), J. Vencl (CS), J. Wilczek (PL), J. Závoti (H), O. Zozulja (SU).

ŜAKLEKSIKONETO (8)

Ĝis nun multloke aperis ŝakaĵoj presitaj: en E-revuoj, gazetoj, libroj, alvokoj, ktp. La ŝakrubrikoj naskiĝismortis...
Pri tiuj rubrikoj ni ankoraŭ skribos.
Nuntempe ekzistas ŝakrubrikoj: en „Hungara Vivo", „Heroldo de Esperanto", „La Tornistro", „Juna Amiko".
Ni kun granda ĝojo donus sciigon pri naskiĝo de novaj ŝakrubrikoj...

Pro la bonaj solvoj de la problemoj (3-a kaj 4-a) gajnis libropremion per lotado W. Loose (GFR) kaj A. Keresztes (H).

KOMUNIKO

Pro la pensiiĝo de Mihály Gergely, ĉefredaktoro de la revuoj *Hungara Vivo* kaj *Világ és Nyelv* (Lingvo kaj Mondo), la Estraro de Hungara Esperanto-Asocio faris la jenan decidon:

Ĝi nomis redaktoro de *Hungara Vivo* Vilmos *Benczik*, kaj redaktoro de *Világ és Nyelv* (Lingvo kaj Mondo) Imre *Szenes*. La novaj redaktoroj komencas sian agadon per la redakto de la numero 1977/5 de ambaŭ revuoj.

OPTIMISME

Redaktoro devas esti optimisto laŭofice. Kaj li devas havi ankaŭ ambicion kaj memfidon. Sen tiuj kvalitoj ja certe li ne kuraĝus surpreni la taskon de la konstanta divenado: pri kio volas legi la plurmil-kapa legantaro de lia revuo?

Tiasence redaktado estas certagrade ĉarlatanado. Ĉarlatanado, ĉar redaktoro alfrontas taskon pri kies solvo li havas nur metodojn bazitajn sur konjektoj, ne sur firmaj konoj. Pluroble tio validas por redaktoro de Esperanta revuo, ja ĉi tie la kontaktoj de la redaktoro kun la —cetere ege diversa — legantaro estas nur sporada. Tamen li eksidas ĉe sia skribotablo, cerbumas pri la enhavo de la sekva numero, kaj, por ĉerpi iom da kuraĝo, li kredigas al si, ke li scias tion, pri kio li havas efektive nur nebulajn supozojn.

Tiel ankaŭ la subskribinto alfrontas la novan taskon. La fakto, ke ĝi sekvas pli ol jardekan partoprenon en la redaktaj laboroj, ne nur faciligas, sed ankaŭ malfaciligas la komencon. La faciligo konsistas en tio, ke abundis ebloj ĉerpi el la riĉaj spertoj de la antaŭa redaktoro, Mihály Gergely, kiu preskaŭ dum naŭ jaroj redaktis nian revuon kompenente kaj kun sindediĉo. Nun, kiam li rezignis pri tiu ĉi volonte farita, sed elĉerpa tasko, kiu dum preskaŭ jardeko grave malhelpis lin aktivi kiel nacilingva verkisto, estas malfacile sekvi post li. Dum lia redaktorado Hungara Vivo fariĝis kultura revuo internacie rekonata, alte taksata. Estos malfacile teni la nivelon, kiun li atingis.

Ĉe similaj okazoj oni kutimas certigi la leganton, ke tamen, ne timu, la redaktoroj faros sian eblon... Mi ne volas promesi pirojn sur saliko, tiom pli, ĉar dum tiu ĉi jaro pro la printempaj frostoj en Hungario eĉ pirarboj avare fruktis tiujn. Sufiĉu do nur promeso, ke la nova redaktoro klopodos liveri interesan revuon al la legantaro. Mi bone scias, ke tia promeso certigas pri nenio, sed diable, kial ĝuste legantoj vivu senriske...?

Vilmos Benczik

La ĝusta solvo de enigmo aperinta en HV 77/1. estas: „Plej granda potenco kušas en la komenco." kaj „Pagi sen partopreno por fremda festeno." *Pere de lotumado libropremion gajnis:* A. S. Melnikov el Soveta Unio, Teodoro Löwenkopf el Izraelo kaj Tibor Papp el Hungario.

La ĝusta solvo de enigmo en HV 77/2. estas: „La pura rimo — jen plezur' Sed pli valoras pura penso, (plej nonbla don' de l' homa menso,) ol ĉiu rima pur'." *Libropremion gajnis:* Helge Monrad Christensen el Daniv, Miroslav Hromas el Ĉehoslovakio kaj István Szücs el Hungario.

HV. 77/ 1. Solvo: „La mara rabisto" kaj „Lama arbaristo". *Libropremion gajnis:* Jean-Pierre Danvy el Francio kaj dro István Csató el Hungario.

LETERKESTO

Marie Bartovská, CS, Frydek-Mistek: vortoj venas kaj restas aŭ malaperas ankaŭ en nia lingvo, kiu evoluas, modifiĝas simile al aliaj „naturaj" lingvoj. La praktiko decidis pri la superfluaj neologismoj: *darfi* jam malaperis, kvankam diferencis de *lici;* ankaŭ materialoj povas esti *duraj*, kaj eblas *ascendi* ekz. trajnon, ambaŭ estas bezonataj vortoj — konsultu PV! Viaj rimarkoj ĉiam estas bonvenaj, neniel malkonvenaj.

Lontaigne N., Fr., Montpellier: ni konsentas kun viaj lingvaj kritikoj, ja kiel vi skribis: „eĉ la plej lertay povas erari... ankaŭ en la Plena Ilustrita Vortaro restis eraroj." Koncerne niajn akuzativo-erarojn, menciitajn de vi, restas nenia dubo: ili devenis simple el bedaŭrindaj preseraroj, kaj ne el ia malbona principo.

Astafjev P. E., SU, Kujbiševo: *La vorto*, poemo de J. Balbin, profundiĝas en la abomenindaĵojn multe pli ol vi rimarkis. La poeto pledas ne por sed ĝuste *kontraŭ* la — domaĝe — „ne-malhalvebla vorto", do kontraŭ la poezie listigitaj tragikaj fiaĵoj! — Dankon pro la lingvaj rimarkoj, utiligataj.

Jiři Patera CS, Most: ni volonte mencias la meritplenan agadon de eldonejo „Moraviaj Esperanto-Pioniroj" inter la du mondmilitoj. Ĝi eldonis dekon da libroj, tradukojn el la ĉeha literaturo, i. a. RUR de Čapek, fervore kontribuinte al la E-kulturo. — Via deziro por *komuna eldonejo* de pluraj landoj, resp. landaj asocioj por E-aj libroj kaj gazetoj estas simpatia kaj certe utila; tamen nun baras tion tro multaj malfacilaĵoj.

Zbigniew Lepieszkievicz, PL, Koszalin: ravita kaj forte impresita vi skribas pri „Balado pri la pano kaj cirko" (HV 77/2), ankaŭ pri ties unuaranga tradukado. La aŭtoro apogis sin je reala evento en la iama Hungario, kies duonfeŭdismaj mizeraĵoj respeguliĝas en la Balado. Informu nin pri ev. arta prezentado de tiu Balado!

Korespondi deziras

Pri literaturo, artoj, naturo, ŝangi bk.: Anna *Balanik* (25) matematikistino pentro-albumoj, SU—290012, *Lvov*, ul. Poĵarskovo d. 4—5. kv. 27. — Ekonomistino Alicja *Sacha*, tur. gvidanto (28) kun hungaroj vere amike, PL—32—853 *Lysa Góra*, voj. Tarnów. — Erzsébet *Kiss* (22) kun gejunuloj, H—8800 *Nagykanizsa*, Kodály Z. u. 1/G. — Anna *Decio*, (26) I—20032 *Cormano Milano*, Via Matteotti 1. — Stefania *Ricetti* (23) I—20100 *Milano*, Via Pelizza Volpedo 41. — Anna kaj Maria *Crovace* (28, 23) I—20100 *Milano*, Via Barzoni 4. — Olga *Karpova* (18) studentino, SU—252180 *Kiev*, Nejinskaja 14. — Laimundas *Abromas* (22) serioza s-ano kun gehungaroj, SU — 234432 *Jurbarkas*, p. Šiliné, Litovio. — Andrzej *Tandul* (18) kun gehungaroj, sporto, pm, muziko, PL—84—230 *Rumta*, ul. 3. Maja 49.

Interŝanĝas: tur. prospektoj, pm, bk, Ryszard *Szczygiev*, PL—67115 *Bytom Odrzanski*, ul. Szeroka 24. — Bk. kun italaj gejun., koresp. ŝakludus *Szőke* Lajos, H—3732 *Kurityán*, Kossuth út 34. — Klub Intern. Druĵbi, bk. kun junuloj, SU—456930 *Kusa*, Celabinsk. obl., Škola 7. — Sergio *Casati* (40) pĉt. I—20100 *Milano*, Via Abbondio 15. — Emilio *Pellizzari* (40) pĉt. *Milano*, S. Giorgio. — Ivo *Monti* (22) bk, I—22074 *Lomazzo Como*, Via Rosales 7. — Marisa *Lauro* (31) pĉt., bk, I—20100 *Milano*, S. Ampelio 5. — Pri sindefendaj sportoj (karate ks.), junul. probl., Valdemaro *Miksa* (19), laboristo en ŝipfarejo, PL—80—618 *Gdansk*, Slogi, ul. Wrzosy 24 c/m3., prec. kun orientanoj. — Marek *Kusmierczyk* (27) bk. PL—32—333 *Slavków*, str. Stawki 9. — Józef *Suchanek* (70), landkartoj, rec. vizitoj, PL—41—902 *Bytom*,, str. Zamenhofa 1m7. — Marzenna *Sroka* (22) oficistino, bk, *Bytom*, str. Powst. Warsz. 10/6. — Maria-Jolanta *Kazibutowska* (25) studentino, bk, PL—43—100 *Tychy*, w. Katowice, str. Cyganerii 31/16. — Wlodzimierz *Malinowski* (38) filatelisto, PL—59—902 *Zgorzelec*, w. Jelenia Góra, str. Tuwima 28/6. — Joachim *Hoffarth* (28) bk, pĉt, DDR—89 *Görlitz*, Struvestr. 13. —

Mgr. Miroslaw *Wiechowski* (30) malnova e-isto, pri kvakerismo, *Warszawa* 572, Al. Wyzwolenia 9m 35. — Kafejo ESPERANTO, Wanda *Olesik*, kol. esp-aĵojn por reklami E-on, PL—42—311 *Zarki Letnisko* str. 22. Lipca 15. — Elzbieta *Rzeszutek*, *Wroclaw*, DS Sabinki, str. Drukarska 24A, pĉt. — S-ano Fezoj *Ikswogor*, kol. E-insign., koresp. pri E-movado. Peras leterojn, bk, al diversaĝaj grupanoj en *Dzialdowo* PL —13—200, voj. Ciechanów, str. Nidzicka 17/7.

HUNGARA VIVO

Ĉefredaktoro: Vilmos Benczik
Responda redaktoro:
d-ro István Nagy
Arta redaktoro: Éva Farkas-Tatár

Redaktoraro:
Szilárd Bálint, Ada Csiszár, Márton Fejes, Ervin Fenyvesi, István László, d-ro Lajos Lesznai, László Rieth, d-ro Mária Rózsa Szabó, Zsuzsa Varga-Haszonits

Ĉefkunlaborantoj:
Ludoviko Kökény, Alfonso Pechan, Aurél Ponori Thewrewk, d-ro István Szerdahelyi, Lajos Tárkony

Redakcio: Budapest VIII.,
Kenyérmező utca 6.
Telefono: 141-078, 137-872

Eldonas: „Népszava" Gazeteldona Entrepreno, Budapest VII., Rákóczi út 54.

Responda eldonisto: D-ro Péter Suth direktoro

Disvastigas la Hungara Poŝto. Aboneblas en ĉiuj poŝtoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (K.H.I. 215—96162 1900 Budapest V., József nádor tér 1.) senpere, aŭ per poŝtmandato.

La abono estas por jaro (ses numeroj) Ft. 48.—, al eksterlando krome Ft 9.60 por afranko.

Peranto al eksterlando: KULTURA, H—1389 Budapest P.O.B. 149
Abonprezo por unu jaro (ses numeroj): 7,— Usonaj dolaroj aŭ egalvalora sumo en alia valuto

77-4565 Somogy m. Nyomda 3350
Responda gvidanto:
Béla Farkas direktoro
Indexszám: 25 377
ISSN 0018—7704

LEHEL

LIZENZ BOSCH HAUSGERÄTE

BOSCH 200 * * *

Ultrafridujo 20-litra

Temperaturo sub —18° C

Prezo: 6050 Forintoj

Fabrikas: Hűtőgépgyár — Fridujfabriko

Eksportas: LEHELEX

Konsumturist



Valoraj artobjektoj
porcelano de bona marko
stilmebloj

Varojn aĉetitajn
en la subaj vendejoj oni povas
sendogane elporti el la lando

Vi povas aĉeti el granda sortimento kontraŭ valuto internacie ŝangebla

en niaj vendejoj en Budapeŝto:
I., Hess András tér 3.
VI., Népköztársaság útja 27. kaj 43.
Hotel Intercontinental — Hotel Gellért